

MONATO


Hobio
Kolekti
sonorilojn

Lernout & Hauspie

Lingvokrea entrepreno

Komunikado
en aviado

MONATO - serio



Historio de la
ekonomika pensado

Prezoj

		MONATO		LA JARO
		surf.	aere	aere
Aŭstralio	AUD	72	81	11
Aŭstrio	EUR	39	44	5
Belgio	EUR	39	44	5
Britio	GBP	29	32,6	3,6
Danio	DKK	298	336	38
Finnlando	EUR	39	44	5
Francio	EUR	39	44	5
Germanio (ok.)	EUR	39	44	5
Germanio (or.)	EUR	32	37	5
Hispanio	EUR	32	37	5
Irlando	EUR	39	44	5
Islando	EUR	39	44	5
Israelo	EUR	32	37	5
Italio	EUR	39	44	5
Japanio	JPY	5900	6760	860
Kanado	CAD	67	76	10
Luksemburgo	EUR	39	44	5
Nederlando	EUR	39	44	5
Norvegio	NOK	340	384	44
Nov-Zelando	NZD	82	92	12
Pollando	PLN	70	90	20
Portugalia	EUR	28	33	5
Sud-Afriko	EUR	32	37	5
Svedio	SEK	360	407	47
Svislando	CHF	65	74	9
Usono	USD	47	53	8

Aliaj landoj: Petu la tarifon de la landa peranto, aŭ, se tiu ne ekzistas, de la eldonejo: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Telefono +32 32 34 34 00; telekopiilo +32 32 33 54 33; retpoŝto: admin@fel.esperanto.be.



Vizitu la retajn paĝojn de la revuo

<http://monato.esperanto.be>

Al kiu pagi?


al via landa peranto

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-Domo, 143 Lawson Street, Redfern, N.S.W. 2016 Aŭstralio. R: esperfed@ans.com.au
Aŭstrijaj: AEM, Margarethengürtel 100 11/2, 1050 Wien. Banko: Die Erste, konto 000-99511. R: rudipueh@chello.at. • Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. (pĉk. 7.127.144). R: apmarks@ping.at
Belga: FEL, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). R: admin@fel.esperanto.be.
Brazila: BEL, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasília (DF). R: bel@brnet.com.br.
Britaj: EAB, 201 Felixtowe Road, Ipswich IP3 9BJ, Britio (pĉk. 54 891 4007). R: eab@esperanto.demon.co.uk. • Paul Hewitt, 26 Highfield Road, North Thoresby, Great Grimsby, South Humberside, DN36 5RT. R: paul@esperanto.freeserve.co.uk.
Ĉeĥa: Vládslav Hasala, A. Dvořáka 1, CZ-696 62 Strážnice. R: vlada_hasala@iol.cz.
Ĉina: El popola Ĉinio, P.O.Kesto 77, 100037 Beijing. R: libroservo@china-report.com.
Dana: A. Birkbak, Rugvaenget 46, 2. tv., DK-2750 Ballerup (pĉk. 1705121 Girokontoret Høje Taastrup).
Estona: Virve Ermits, Mahla 65-1, EE-0012 Tallinn.
Filipina: Manfred Führer, Dalongue 2419 Santa Barbara, Pangasinan. R: fam.fuehrer@t-online.de
Finnaj: Heta Kesälä, Kalamiehenkuja 3D32, FIN-04300 Tuusula. Konton-ro: 800029-19438647. • Oy Mendoservo Ak, Kivistöntie, FIN-05510 Hyvinkää, pĉk. 427 72-2.
Francaj: UFE, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). R: esperanto-france@esperanto.org • Esperanto-Klubo de Metz, 36 rue St. Marcel, 57000 Metz.
Germanaj: Hilde Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg (LIGA Augsburg 113514, BLZ 720 903 00) R: maul@newsfactory.net. • Manfred Führer, Am Stadtpfad 11, D-65760 Eschborn (pĉk.: 115471-758 ĉe postbank Karlsruhe; bankkodo 660 100 75). R: fam.fuehrer@t-online.de • Literatura-Servo „Espero“, Rolf Beau, Saxoniastraße 35, D-04451 Althen (Postbank Leipzig konton-ro: 010 2939 901 (BLZ 86010090) R: RoBo.ESPERO@t-online.de.
Hispana: Juan Azcuénaga Vierna, General Dávila, 127, portal 7, 2º izda., Santander (pĉk.: 03548531).
Hungara: Attila Kovács, Barackos u. 1, 7635 Pécs. R: akovacs@cosoft-bt.com.
Irlanda: Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12.
Islanda: Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-121 Reykjavík.
Itala: Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204).
Japanaj: KLEG, Sonehigasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Osaka-hu 561. R: kleg@mvf.biglobe.ne.jp. • Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162-0042. R: jei@mre.biglobe.ne.jp.
Kataluna: KEA, Apartat 290, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions, Agència 461, konto 550/53).
Kanada: Kanada Esperanto-Asocio, P.O. Box 2159, Sidney, B.C., V8L 3S6. R: phopkins@uvic.ca
Korea: Korea Esperanto-Asocio, Kangbyon Hanshin Core B/D N-ro. 1601, 350 Mapo Dong, Mapo-gu, Seoul 121-703, Koreio. R: keast@soback.kornet.nm.kr. • Seula Esperanto Kulturcentro, dir. Lee Jung-Kee, CPO Kesto 3047, 100-630 Seoul. R: esperant@unitel.co.kr.
Kostarika: Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto miaumiau@sol.racsa.co.cr.
Kroataj: Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb. R: mbelosev@public.SRCE.hr • Višnja Branković, Via Leghissa 6, I-34131, Trieste. R: orbispictus@iol.it.
Latva kaj litova: Laimius Stražnickas, a.k. 1469, LT-2040 Vilnius 40, Litovio. R: stralaim@takas.lt.
Luksemburga: LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: 8936-12). R: wickler.albert@gmx.net.
Nederlanda: Libro-Servo Esperanto Nederland, Marnixstraat 57, NL-2023 RB Haarlem (pĉk.: 111278). • UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. R: uea@inter.nl.net.
Norvega: Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. R: esperanto@online.no
Nov-Zelanda: Gwenda Sutton, 12c Herbert Gardens, 186 The Terrace, 6001 Wellington. Tel.: (04) 473 0847. Faksilo: (04) 473 0848. R: Sir_Lancelot@compuserve.com
Portugala: PEA, R. Dr. João Couto, 6, R/C.-A, P-1500 Lisboa. R: ap.esperanto@clix.pt
Pola: Skribu al la eldonejo kaj pagu al Danuta Leyk, konto 10201143-216586-270-41-111 ĉe PKO BP XIV 0/Wwa.
Rusa: Halina R. Gorecka, p.k. 67, RUS- 620077 Jekaterinburg-77. R: hrgo@sbank.e-burg.su
Slovenaj: Višnja Branković, Via Leghissa 6, I-34131 Trieste. R: orbispictus@iol.it. • Jovan Mirković, Mirna 5, SLO-2000 Maribor. R: j.mirkovice@siol.net
Sud-Afrika: Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. R: cbeckford@ppc.co.za.
Svedaj: Esperanto-Skolan, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.ĝ. 355001-9. • Sveda Esperanto-Federacio, Södra Rörum pl 455, S-24294 Hörby.
Svisa: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel.
Usona: ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. R: elna@esperanto-usa.org
Venezuela: J.E. Bachrich, Apartado 70782, 1071A Caracas. R: jebachrich@hotmail.com

aŭ rekte al la eldonejo

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

- Se en via lando ekzistas eŭroĉekoj, vi povas sendi tian ĉekon. La valuto devas esti la **belga franko** (BEF) aŭ **eŭro** (EUR) kaj dorse de la ĉeko devas troviĝi **via bankkartnumero**;
 - Posedantoj de VISA-, MASTERCARD-, EUROCARD- aŭ ACCESS-kreditkarto simple sciigu per subskribita letero sian numeron kaj validodaton;
 - Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon. La kontkodo de Flandra Esperanto-Ligo estas fela-x;
 - Se vi havas konton en usona banko, sendu al ni ordinaran usonan bankĉekon; la valuto devas esti la **usona dolaro** (USD).
- Nur se vi ne povas pagi laŭ unu el la kvar supraj vojoj, uzu la jenajn, kiuj tamen kostos al vi iom pli:
- Se en via lando ekzistas poŝtĉekkonta sistemo, vi povas pagi al poŝtĉekkonto n-ro 000-0265338-43 (poŝtĉek-oficejo Bruselo, Belgio), de Flandra Esperanto-Ligo; aldonu al la sumo 1,50 EUR aŭ egalvaloron pro la bankkostoj;
 - Sendu al ni ordinaran bankĉekon el via lando, prefere en belga valuto. Aldonu al la sumo 5,58 EUR aŭ ties egalvaloron plus la sumon kiun fakturos via banko. Bv. informiĝi tie. Sur la ĉeko vi nepre skribu la nomon **Flandra Esperanto-Ligo**.






Estimataj gelegantoj,

Mi pekis kontraŭ unu el la feraj principoj de ĵurnalismo: neniam asertu ke io okazis antaŭ ol ĝi vere okazis! Sed mi en „el mia ridpunkto” en la decembra numero skribis: „Novan prezidanton havas ankaŭ Usono...”. Tion mi verkis fine de oktobro, la elektoj en Usono okazis la 7an de novembro, kaj vi ricevis la decembran numeron de MONATO eble jam komence de la lasta monato de 2000 – do en tempo, kiam Usono neniel jam havis novan prezidanton. Vi do prave povas aserti, ke mi mensogis; jen do puno pro mia ĵurnalista peko. Bone, vi eble scias, ke artikoloj en nia magazino estas verkitaj minimume unu monaton antaŭ apero, ĉar la teknika produktado kaj ekspedado bezonas ĉ. kvar semajnojn. Mi, verkante tiun tekston, ja prave povis supozi ke elektoj en Usono vere okazos je la anoncita dato. Sed kiu ja povis supozi, ke el tio rezultos tia plursemajna politika kaj jura spektaklo, pro kelkcent voĉdonoj? Kiu povis atendi, ke unu el la plej malnovaj demokratioj tiom ridindigos sin? La prezidanto, kiun oni epitetas „plej potenca viro de l’ mondo”, estas elektita de nur unu kvarono de elektorajtaj usonanoj, do tri kvaronoj ne volis havi lin. Tion Usono havis jam pli ofte, sed la pli granda makulo estas, ke sen klara, certigita plimulto kaj kvazaŭ nur hazarde Bush fariĝis prezidanto. Bone, ĉi ĉion nek vi nek mi povis imagi en oktobro 2000, sed tio ne forigas mian supre menciitan pekon. Do mi ĵuras: neniam plu mi asertos antaŭ la fino de la spektaklo, ke Usono havas novan prezidanton.

Sincere via Stefan Maul

PS: Verkita la 14an de decembro 2000, la tagon post oficiala agnosko, ke Bush venkis.

leteroj	4
el mia vidpunkto	5
- Memdetrua homaro	
politiko	6
- FERVOJOJ: Politiko elreligita	
- ĈEĤA RESPUBLIKO: Senato sen ŝato	
- KORUPTECO: Putrantaj demokratioj	
- BALKANIO: Paŝo al paco	
ekonomio	8
- BELGIO: Lernout kaj Hauspie: revo finiĝis (Kovrilo)	
- ĈINIO: Esperiga estonto	
- BALKANIO: Pliigita aktivado de LUKoil	
moderna vivo	12
- EDUKADO: Studentoj universitaton soifantaj ▶	
- AVIADO: Prefere pakete	
- JAPANIO: Ne mortis mortiga malsano	
- JAPANIO: Tradicio sigelita	
- POŝTELEFONOJ: Ĉu beno aŭ malbeno	
- SVISIO: Invadas la angla	
- Reago: Ne tiom negative ...	
serio	16
- Historio de la ekonomika pensado / Parto 1: Antaŭmerkantilisma ekonomia pensado	
lingvo	19
- POLLANDO: Instruisto de la angla serĉata	
- HUNGARA: Lingvo agonianta	
medio	20
- BELGIO: Reen al la edena paradizo ▶	
- LITOVIO-RUSIO: Terlango - natura valoro	
scienco	22
- NATURKATASTROFOJ: Vulkanoj	
- FIZIKO: Ĉu antimaterio en la universo	
- Reago: Deĉifrado de la paskinsula skribo	
hobio	24
- FINNLANDO: Kolekti sonorilojn ▶	
novelo	26
- de Julian Modest: Vetih	
libroj	28
informoj de l’ MONATO	30



Fremdula UN-legio

Jacques Douady en sia bonintenca kritiko (MONATO, 2000/10, p. 4) ne priatentis la fakton, ke ekzempleco ne identas kun sameco. Proponante dungotan soldataron pere de kiu UN protektu senkulpajn viktimojn de kru-elaj frenezaĵoj, neniu racia persono rekomendus senbridajn sovaĝulojn. Tiaj UN-taĉmentoj memkompreneble devus esti trejnitaj milite kaj morale, ĉiel altkvalite, kaj kontrolataj de altkvalitaj oficiroj. Tiaj UN-militistoj tre verŝajne estus savintaj milojn da senkulpaj viktimoj en Ruando kaj eks-Jugoslavio. Almenaŭ ili povus fari tion estontece.

Werner SCHAD, Argentino

Antisemitismo kaj antijudismo

Atente relegante la papan dokumenton pri la pardonpeto pro la pekoj de katolikoj, kaj oficialajn komentojn pri ĝi, mi ne trovas ke la papo pardonpetis pro antisemitismo de katolikoj. Ĉu okazas ke Maul kunigas kaj veldas (MONATO, 2000/11, p. 5) antisemitismon kun antijudismo? Pri tiu lasta la papo, jes, pardonpetis. La du konceptoj ne koincidas inter si: la dua fakte kulpigas pro konduto, vere aŭ supoze, nejusta aŭ malmorala ktp; la unua rifuzas kaj kondamnas pro rasaj motivoj. Ne kredindas ke la laŭjarcenta oponado al judismo de epigonoj de kristanismo, katolika kaj protestanta kaj alispece kristana, povis naskiĝi el la volo ekskludi rasojn el la universala savo farita de Kristo.

Antonio CAPPELLO, Italio

Ŝatata rubriko

La rubriko „Spirita vivo” apartenas al miaj plej ŝatataj rubrikoj. Religio estos en la 21a jarcento anakronismo, spite ke la plimulto de la homoj estas religiaj, ĉu pro manko de klereco, ĉu pro manko de intelekto. Sed por mi religiaj stultaĵoj estas neelĉerpebla fonto de amuzo.

Jiri PROSKOVEC, Germanio

Celtrafa milito

Stefan Maul (MONATO, 2000/11, p. 3) skribas, ke li malaprobas la atakojn de NATO kontraŭ Jugoslavio kaj ke NATO ne atingis sian celon forpeli Miloŝević. Mia opinio ne povis esti la celo de NATO lin forpeli, ĉar ankaŭ en la golfa milito usonanoj kaj britoj ne sukcesis forpeli Saddam Hussein. Sendube la

atakoj de NATO kaŭzis multajn suferojn al la serba loĝantaro, sed diru al mi alian eblan rimedon por devigi Miloŝević ĉesigi sian buĉadon kaj masakradon en Kosovo?! Laŭsperte Miloŝević komprenis unusolan lingvon, tiun de perforto kaj milito; li nur reagis, kiam oni respondis per la sama lingvo. Mi tute ne konsentas kun Maul, ke la atakoj de NATO estis vanaj: sen ili ni ankoraŭ hodiaŭ havus centmilojn da Kosovo-albanaj fuĝintoj en tuta Eŭropo kaj serboj estus konkerintaj tutan Kosovon por tie loĝigi plene serban loĝantaron; Kosovo-albanoj ne estus povintaj reveni al siaj hejmoj. Cetere, nur per perforto kaj militrimedoj oni ĉesigis militon en Bosnio. Sen la NATO-atakoj serboj eĉ hodiaŭ glorus Miloŝević kiel heroon, kiu sukcesis konstrui grandan serban ŝtaton kun tute serba Kosovo: tio ja estis lia celo.

Luciano ORTELLI, Svislando

Vatikano rebatas (1)

Laŭ Dominus Jesus: „Dio volas ke ĉiuj homoj estu savataj kaj atingu la konon de la vero” (22 kaj 1 Tm. 2,4)... Por tiuj, kiuj ne estas formale kaj videble anoj de la (katolika) Eklezio, la savo de Kristo estas alirebla danke al graco kiu lumigas ilin adekvate al ilia interna kaj media situacio (20)... Oni ne ekskludu la agadon de Kristo kaj de la Spirito ekster la videblaj limoj de la Eklezio... La Regno rilatas ĉiujn: la personojn, la socion, la tutan mondon (19)...” (MONATO, 2000/11, p. 18) Se tio estas en „Dominus Jesus”, ĉu vere la Katolika Eklezio kondamnas miliardojn da homoj vivintaj, vivantaj kaj vivontaj al la infero? Ni estu seriozaj. Ni legu la originan tekston. Ni ne tro fidu je la amas-komunikiloj, kiuj en la tuta mondo ofte mislegas, resumas... kaj kuiras laŭplaĉe!

Antonjo GAMBUTI, Italio

Vatikano rebatas (2)

„Konsole estas,” skribas Maul komentante *Dominus Jesus* (MONATO, 2000/11, p. 18), kie estas dirate ke nur la katolika eklezio konservas ĉiujn karakterizojn de kompleta kaj integra eklezio, „ke spite al tia verdikto Vatikano ne povas malpermesi al ili eniri siajn proprajn ĉielojn ...”. Maul pravas, ĉar ĉiuj oficialaj katolikaj manlibroj pri katolika dogmaro, kompilitaj en la lastaj jarcentoj, trenas la saman doktrinon: Kristo savas ĉiujn homojn kiuj sekvas la veron laŭ opinio de ilia konscienco! Kial Maul ne vidas koincidon inter tiu sia juĝo

kaj tiu de *Dominus Jesus* kaj tiuj de la tradiciaj lernolibroj uzataj en katolikaj seminarioj kaj teologiaj fakultatoj?

David CASTELLANO, Italio

Vatikano rebatas (3)

Ĉu katolikoj rajtas diri „dankon al Dio, ke ni ne estas samaj kiel aliaj: protestantoj, ortodoksuloj, ...” same kiel tiu fariseo en la templo? Tion ja signifas la pretendo, ke la katolika eklezio estas la sola vera (MONATO, 2000/11, p. 19). Ni estas mezurataj laŭ niaj fruktoj kaj ne laŭ niaj pretendoj!

Frieder WEIGOLD, Germanio

Vatikano rebatas (4)

Mi legis (MONATO, 2000/11, p. 5), elplume de la ĉefredaktoro Maul, du asertojn, kiujn mi el historia kaj morala vidpunktoj ne povas lasi senkommentaj. Ne estas vero, ke serboj havas nenian sperton pri demokratio, ĝuste kontraŭe. La reĝlando Serbio en sia lasta periodo transprenis ia tiam plej modernan kaj liberalan belgan konstitucion por sia bezono. La diferenco inter tiu bela papero kaj certe malpli bela praktiko ne estis specifo de la serbia ŝtato; tio estas la problemo de ĉiuj demokratioj ĝis niaj tagoj. Estas menciinda fakto, ke la reĝo Petro 1a, kiu defendis sian ŝtaton kontraŭ la aŭstrohungara invado kaj formis la reĝlandon de serboj, kroatoj kaj slovenoj, kiel studento en Londono tradukis la faman libron de J. S. Mill „Eseo pri libereco”, kiu apartenas al la fundamentaj tekstoj de la demokratia pensado. Eĉ sub la despota regado de Miloŝević ĉiam denove la popolo protestis, multe pli ol protestis aliaj popoloj en similaj okazoj.

La rimarko pri la papo Pio 9a, ke li „ekzekutigis” homojn, eĉ se tio estas vera, estas sensenca, ĉar tiutempe ĉiuj ŝtatestroj aplikis mortpunojn. Ĉu oni povas preni por krimulo la tribunalon en Nürnberg, kiu ekzekutigis hitlerajn krimulojn? Vinko OŠLAK, Aŭstrio

Pri la enhavo de leteroj respondecas la aŭtoroj mem. La redakcio havas la rajton mallongigi leterojn kaj glatigi la stilon (=zamenhofa!). Reagoj al artikoloj ricevas prioritaton. Skribu al:

FLANDRA ESPERANTO-LIGO

MONATO (Leteroj)

Frankrijklei 140

B-2000 Antwerpen

Belgio

Retadreso:

guido@fel.esperanto.be

Memdetrua homaro

Dum monatoj furoras en vastaj partoj de Eŭropo angoro pri bova spongeca encefalopatio (mallonge BSE, populare „bovofrenezo”), terura kaj teruriga malsano, kiu ne nur atakas bovojn sed transsaltis al homoj. Laste tio ŝokis Germanion, kiu arogante ĉiam deklaris sin „BSE-libera”, sed fine de la pasinta jaro trovis proprajn frenezajn bovojn.

Tiu ĉi estas nur unu el pluraj homkreitaj fatalaĵoj, kiuj kapablas detruo la homaron. Aliaj estas ekzemple poluado de nia vivmedio per venenoj kaj radioj. Por tiu ĉi memdetruado de l' homaro bovofrenezo estas aparte klara ekzemplo. Kio okazis? Ĉar en la konsumisma socio oni avidis pli kaj pli al manĝado de viando, bredistoj industriigis la produktadon. Por ke brutaro kresku pli rapide kaj pli „kvalite”, oni donis al ĝi ne nur naturan furaĝon sed kromajn nutraĵojn kaj medikamentojn. Ĉar konsumantoj volas havi nur plej bonajn pecojn el buĉita besto, oni devis forĵeti la reston. Sed oni ja povis uzi kadavrojn ankaŭ por nutri bestojn kaj tiel havi duoblan profiton.

Perversa faruno

Sekve oni ne simple bruligis kadavrojn, sed faris el ili novan nutraĵon, kiun perverse oni nomis „bestofaruno”. Oni uzis tiucele eĉ malsanajn bestojn, interalie ŝafojn, kiuj mortis pro „ŝafofrenezo”. Kaj tiun malsanigan „bestofarunon” oni donis ne nur al

karnomanĝuloj, kiaj estas porkoj kaj kortbirdoj (kiuj hodiaŭ plej ofte estas „kaĝobirdoj”), sed - kulmino de l' perverso - ankaŭ al vegataranaj bovoj, tiel farante ilin kanibaloj.

Krima kaŝado

La „naturo” rebatis, malsanigante unue bovojn kaj poste homojn. Sed eĉ kiam oni rimarkis tiun ĉi fatalan eraron, oni kaŝadis dum jaroj la veron; britaj registaroj ekzemple, por ne damaĝi la proprajn bredistojn, anstataŭ averti konsumantojn pri la riskoj, kaŝis kaj sekretigis sciencistajn ekkonojn. EU-instancoj same bagateligis la danĝeron. Jes, oni malpermesis nutri bovojn per „bestofaruno”, sed tio okazis tro malfrue, kaj krome ne eblas kontroli, ĉu la malpermeso estas observata. Neniu scias, kiom da homoj jam estas infektitaj per bovofrenezo. Kaj kiu povas scii, ĉu la malsano ne jam transsaltis ankaŭ al porkoj, kokoj, meleagroj, anseroj kaj fiŝoj?

Klimata katastrofo

Ankaŭ en aliaj kampoj profito pli gravas ol homaj vivoj. De multaj jardekoj ni scias, ke en industrio kaj aŭtomobiloj uzataj substancoj venenas la teron. Por eviti kolapson de la monda klimato, oni aranĝis multajn konferencojn, sed la plej grandaj poluantoj, kun Usono ĉe la pinto, por ne damaĝi la propran industrion malhelpas tutmondan konvencion por reduktado de la venenoj. Do la homaro daŭrigas detruo sin mem per klimata katastrofo.

Alia ekzemplo estas poŝtelefonoj. Jam delonge ni scias, ke ankaŭ ili estas malsanigaj pro la radioj uzataj por tiu ĉi moderna kaj populara komunikilo. Ties radioj atakas la homan cerbon, krome la pli kaj pli multaj antenoj por poŝtelefonaj retoj venenas la vivmedion precipe en dense loĝataj regionoj. Tamen, anstataŭ malpermesi tiajn poŝtelefonojn kaj postuli sendanĝeran teknikon, iuj registaroj ekhavis la grandiozan ideon, preskribi (kiel ĉe


tabako) surskribojn pri sanrisko kaj doni konsilojn, kiel malgrandigi danĝeron. Cetere: EU preskribas presi sur cigaredskatoloj averton pri mortorisko, sed samtempe subvencias per mono el impostoj tabak-kultivadon. Ĉu eblas agi pli absurde kaj cinike?

Perfekta projekto

Belegan ekzemplon pri tia absurdeco ni trovas ankaŭ en Germanio. Ties registaro, laŭ promesoj dum elektokampanjo, enkondukis tiel nomatan „ekologian imposton” super benzino. La intenco estis, per plikostigo de karburajo redukti individuan aŭtomobiltrafikon; samtempe oni volis doni pli da mono al medikonvena fervojo. Sed kiam, pro aliaj kialoj, benzino ege plikostiĝis, pro protestoj de civitanoj kaj opoziciaj partioj la registaro (konsistanta el socialdemokratoj kaj verduloj) ektimis pri sia populareco. Do oni rapidege ŝanĝis leĝon por rekompenci aŭtomobilistojn per subvencio. Nun oni unuflanke enkasigas impostmonon, kiun oni aliflanke redonas al konsumantoj. Tiel redukti venenan trafikon certe ne eblas.

Estas diabla cirklo, ĉar konsumantoj ne volas akcepti avertojn kaj politikistoj ne malpermesas, ĉar konsumantoj volas havi ĉi ĉion, kaj politikistoj volas havi iliajn voĉojn dum elektoj. Senkonteste la memdetruo de l' homaro estas la plej perfekte organizita projekto de tiu ĉi jarcento!


Stefan MAUL



FERVOJOJ

Politiko elreligita

Katastrofe, ĥaose evidentiĝis jardekoj da subinvestado en britaj fervojoj, kiam fine de oktobro paraliziĝis surrela transporto en Britio.



Dum kelkaj semajnoj vojaĝi per trajno fariĝis loterio.

Post rapidtrajna elreliĝo apud Londono kiam pereis kvar homoj, fakuloj anoncis, ke reloj ĉe ĉ. 200 lokoj tra la tuta lando estas tiom difektitaj, ke nepras tuj aŭ fermi liniojn aŭ severe limigi la rapidecon de trajnoj.

Rezulte: miloj da nuligitaj aŭ malfruigitaj trajnoj, centmiloj da koleraj, konfuzitaj pasaĝeroj – aŭ klientoj, kiel nomas ilin la privatigitaj fervojaj kompanioj. El horaroj fariĝis hororoj: preskaŭ senaverte, ekzemple, estis fermita unu el la du ĉeflinioj inter Skotlando kaj Anglio, tiel ke vojaĝontoj estis devigataj envagone pasigi la nokton. Dum kelkaj semajnoj vojaĝi per trajno fariĝis loterio – kvankam kun nula gajno-ŝanco. Ŝtormoj kaj inundoj kontribuis al la ĥaoso, tiel ke dum unu tago apenaŭ trafikis trajnoj en suda kaj meza Anglio. Tiam ankaŭ ŝoseoj kaj flughavenoj estis trafataj.

Profitoj

Ekde 1995 funkcias – laŭ cinikuloj misfunkcias – privatigita fervojo en Britio. Aktuale respondecas ĉ. 25 apartaj kompanioj pri trajn-servoj; alia kompanio, Railtrack [rejltrak], kiu respondecas pri trakoj, signaloj kaj kelkaj stacidomoj, „luigas” siajn trakojn al la aliaj kompanioj, kiuj pagas tarifon kontraŭ ĉiu trajno, kiun ili trafikigas. Tamen por Railtrack – kaj por la aliaj privataj kompanioj – gravas unuavice profitoj kaj akciuloj, duavice sekureco kaj pasaĝeroj. Kvankam Railtrack ja estis informita pri la mizera stato de siaj trakoj, la kompanio – por minimumigi siajn elspezojn – prokrastis la urĝe bezonatan ripar-programon.

Fervoja privatigo en Britio konsistas el bizara miksaĵo de fiasko kaj festo. Fi-

asko, en la senco, ke – kvankam privataj – la kompanioj ankoraŭ konsumas miliardojn da pundoj de la registaro (= de impostpagintoj) – en la lasta jaro de nacia, ŝtata sistemo la fervojoj ricevis subvencion je unu miliardo da pundoj, dum Railtrack jare ricevas trioblon; festo, en la senco, ke pli da varoj, pli da pasaĝeroj estas tage surrele transportataj ol antaŭ kelkaj jaroj (kio tamen rilatas eble al vigla ekonomio kaj al apenaŭa senlabor-eco).

Paneoj

Malgraŭ tio videblas ĉie la efikoj de jaroj da subinvestado. Ĉirkaŭ Manĉestro, ekzemple, ankoraŭ trafikis dizeltrajnoj konstruitaj en la 50aj jaroj; ĉiutagas malfruiĝoj kaj paneoj (ne nur de malnovaj lokomotivoj sed de signala infrastrukturo instalita en la 60aj jaroj); kaj mankas aŭtomata trajnbremso taŭga por la plej rapidaj vagonaroj (Railtrack kaj la aliaj kompanioj rifuzas elspezi la sumojn por sekureco, kiajn ekzemple investis fervojoj en Germanio aŭ Francio). Plue: por ŝpari monon estis elpostenigitaj ĉe privatigo tiom da ofte spertaj, lojalaj fervojistoj, ke nun, por antaŭenigi nun neprajn riparojn kaj plibonigojn, Railtrack estas devigata dungi inĝenierojn el Rumanio.

Ruze

Dispecigo kaj privatigo de iama nacia fervojo signifas, ke okaze de disfalo de la sistemo la registaro – tre ruze – povas sin distancigi. Ĉiu kompanio kulpigas la aliajn: Railtrack siavice la firmaojn koncesiatajn plenumi la laboron, kaj tiuj la etfirmaojn, kiu fakte faras la laboron.

ĈEĤA RESPUBLIKO

Senato sen ŝato

Nur iom pli ol kvinono de la balot-raĵtigitoj en Ĉeĥa Respubliko voĉdonis dum elektoj por la senato, la supera ĉambro de la parlamento. Elektota estis triono de la senatanoj, kaj karakterizis la baloton partoprenado de multnombraj senpartiaj kandidatoj.

Venkis – surprize – t.n. kvarkoalicio de la dekstra senata alo; tamen multaj elektitoj famiĝis pro sia defendado de civitanaj rajtoj. Perdis multajn seĝojn la gvidanta parlamenta koalicio konsistanta el socialdemokratoj kaj la plej forta opozicia Civitana Demokratia Partio.

La senato ekestis pro forta subteno de Prezidanto Havel, tamen multaj ĉeĥoj argumentis, ke malgranda kaj malriĉa lando kia Ĉeĥa Respubliko ne povas ĝui tian lukson. Neintereson pri la elektoj kaŭzis i.a. ekonomia malcerteco kaj alta senlaboreco (10 % de la loĝantaro), kreskanta krimo kaj neplenumo de antaŭaj politikaj promesoj.

Povas esti ankaŭ, ke homoj sopiras je pli facile komprenebla politikaro – eĉ principaro. Esprimis sin instruisto el Ledce antaŭ la baloto tiel: „Ni bezonas modernan dekalogon. Ĉi dekalogo estu klara, esprimpova, konciza, al ĉiu facile komprenebla. Ĝi estu unusignifa, la sama por reĝo kaj subulo, sinjoro kaj servisto. Ĝi devas havi saman senco en ĉiuj lingvoj. Ni devas interkonsenti pri pano, akvo, rajtoj kaj libereco.”
Josef HRADIL

Ĉiu neas respondecon: dume la trajnoj ne ruliĝas. La laborista registaro, kiu kiel opozicia partio laŭte kaj longe kondamnis la privatigo-programon de la tiama konservativa registaro, nun mutas: super promesita malprivatigo almenaŭ de Railtrack ŝvebas embarasa silento.

La sola pozitiva rezulto de tiu ĉi hontindaĵo estas, ke la registaro estas devigita rezigni pri sia plano privatigi flughavenajn kontrolistojn. La publiko, vidinte, ke sur la reloj sekureco kaj efikeco estas buĉitaj sur la altaro de profitoj, rifuzis toleri samajn misojn, samajn frenezaĵojn en la aero. Elreliĝo de rapidtrajno estas unu afero; elaerigo de aviadilo tute alia.
Paul GUBBINS

Putrantaj demokratioj

Ĝenerale oni ne dubas, ke demokratio estas la regmaniero, kiu al la plejparto de iu ajn popolo garantias eblan maksimumon de justeco kaj bonfarto. Sed, rigardante la situacion en pluraj ŝtatoj en Sud-Ameriko, Afriko kaj aliaj mondpartoj, raciaj homoj ofte pridubas nun la enkondukan aserton.

Venezuelo, ekzemple, estas unu el la plej petrolriĉaj landoj de la mondo, demokratie regata dum pli ol kvar jardekoj. Tamen la plejparto de la loĝantoj vivas tre malriĉe. Ankaŭ en la petrolriĉa Niĝerio, en Afriko, la popolo ne prosperas ekonomie. Aliflanke notindas, ke en tiuj ĉi kaj aliaj landoj multaj politikistoj sukcesas sin ege riĉigi.

Egoismaj politikistoj

Okcidentaj landoj konsideras nuntempe nuligi la ŝuldojn (t.e. prunteprenitan monon, ofte malbone, eĉ fraŭde uzitan). Respondecaj entreprenistoj kutimas pruntepreni monon por investi ĝin en profitodonan produktadon. Sed la enŝuldiĝo de multaj ŝtatoj, malbone (aŭ eĉ kanajle) administrataj, fariĝis pro sinriĉiĝo de egoismaj politikistoj. Ĉu pravigeblas donaci tiajn ŝuldojn al landoj, kiuj kapablas nek kontroli la uzon de pruntaĵoj nek kondamni tiujn, kiuj



Fujimori savis.



Chávez: ne tre demokratia.

trompas kaj priŝtelas siajn elektintojn? Certe kulpas ankaŭ la kreditoroj, kiuj pruntedonis monon, sciante pri ĝia onta misuzo.

La parlamentanoj de malriĉaj landoj ofte ricevas tre altajn salajrojn, ege pliampleksigitajn de la t.n. krompagoj kaj de aliaj avantaĝoj (flugbiletoj, loĝejoj, ktp). Tamen ili nek kontrolas nek kritikas malhonestajn elspezojn de la registoj. Kiom da dolaroj lukse malŝparas altranguloj dum superflujaj internaciaj vojaĝoj?

Sana demokratio baziĝas sur funkciado de opoziciaj partioj, kiuj sin kontrolas. Simptomo de putranta demokratio estas, kiam la koruptemuloj de opoziciaj partioj sin reciproke protektas, helpante unu la alian kaŝi la friponaĵojn. En kelkaj landoj la korupteco enrampis eĉ la justicon. Tie malhonestaj juĝistoj kunlaboras (kaj kunprofitas) gaje kun politikistaj kanajloj.

Propraj interesoj

Demandindas, do, kiel bremsi tian memdetruon, tian pereigon de socia bonfarto. En Peruo prezidento Fujimori sukcesis savi sian landon el ĥaoso, deveninta de korupteco en justico kaj parlamento, el gerila teroro kaj ekonomia mizero. Bedaŭrinde misfaroj de kelkaj liaj kunlaborantoj makulis poste tiujn meritojn. Ankaŭ prezidento Chávez en Venezuelo, kiu ne aspektas tre demokratie, estas rezulto de ŝtata krizo, kiu pere de pure demokratiaj procedoj apenaŭ solveblis: ne verŝajnas, ke koruptaj parlamentanoj voĉdonas kontraŭ siaj propraj interesoj.

Feliĉe jam aperis alia taŭga rimedo kontraŭ tiu ĉi socia malsano. En pluraj landoj ĵurnaloj, televido kaj radio denuncas la misfarojn. Ofte ĵurnalistoj agas tiel el sia sana konscienco, aliaj ĝin faras el monavido por vendi artikolojn. Ĉiuokaze la senmaskigo de malhonestaj politikistoj helpas malfortigi ties potencon, kelkfoje eĉ sukcesas forigi ilin. Bedaŭrinde ne mankas okazoj, kie ĵurnalistoj devis pagi tian agadon per sia vivo: krimaj mafioj ne pardonas la senmaskigon de siaj politikaj protektantoj. Werner SCHAD



Paŝo al paco

En novembro 2000 okazis en Zagrebo konferenco inter Eŭropa Unio (EU) kaj okcidentbalkanaj landoj (Kroatio, Jugoslavio, Bosnio-Hercegovino, Makedonio kaj Albanio). Celo: stabiligi la nunan situacion kaj pensigi pri la estonto. Ĉiuj partoprenantoj subskribis la t.n. zagreban deklaron, laŭ kiu EU konsentis aparte trakti ĉiun landon depende de ties ekonomia kaj demokratia evoluo. Por realigi la planojn EU lanĉis fonduson Cart kun 4,6 miliardoj da eŭroj.

Antaŭ la konferenco regis timo, ke EU volas rekonstrui novan komunan ŝtaton en la regiono. Kroatio, kvankam geografie sur la duoninsulo Balkano, daŭre klopodis rebati ĉi tiun ideon, vidante en ĝi politikon de agreso kaj primitivismo. La prezidanto de la EU-komisiono, Romano Prodi, kaj la franca prezidanto, Jacques Chirac [ĵak ŝirák], konstante ripetis, ke EU ne intencas restarigi Jugoslavion.

Militkrimoj

La zagreba deklaro antaŭvidas por la balkanaj landoj kunlaboron kun la Haga Tribunalulo pri militkrimoj kune kun evoluigo de homaj rajtoj kaj demokratio. Kroatio sendube estas tiurilate la plej evoluinta lando en la regiono, kaj kroatoj esperas kiel eble plej rapide komenci traktadon pri asociiĝo kun EU.

Tamen restas problemoj. Dum la konferenco manifestaciis eksaj armeanoj, protestante, ke la prezidanto de Jugoslavio ne pardonpetis pro krimoj kaŭzita de serboj en Kroatio. Malgraŭ tio, la konferenco estas grava unua paŝo al pacigo kaj stabiligo de la plej malstabila regiono en Eŭropo.

Zlatko TIŠLJAR


BELGIO

Lernout kaj Hauspie: revo finiĝis

Dum la pasintaj jaroj la tradiciaj reguloj el la ekonomia scienco rilate al librotenado, financado, ktp, ŝajne ne plu validis. Grandegaj entreprenoj kunfandiĝis ĝis eĉ pli grandegaj entreprenoj, oni anstataŭigis bone konatajn marknomojn per tute novaj, sensignifaj, sed tutmonde bone prononceblaj nomoj, oni taksis la valoron de kompanio laŭ la profito kiun ĝi eble iam liveros, investantoj ne maltrankviliĝis se dum jaroj entreprenoj ne alportis profiton ...

Fine de la jaro 2000 venis la duboj. Transkontinentaj kunfandiĝoj (kiel german-usona *Daimler-Chrysler*) evidentiĝis problemigaj. Bankoj kaj akciuloj demandas sin kiam interretaj vendejoj (kiel *amazon.com*) finfine anoncos pozitivajn spezo-kontojn. Internaciaj telefonkompanioj, kiuj je giganta prezo akiris licencon por ekspluati la sekvantan generacion de poŝtelefonoj en kelkaj eŭropaj landoj, nur pene trovas la monon por pagi tiun licencon.

En Belgio unu tia entrepreno nun estas kolapsanta. Kvankam tra ĝi pasis egaj kapitalfluoj, finfine el tutmonda vidpunkto tio estas bagatela afero kaj nur la belgaj (eĉ nur la flandraj) gazetaro kaj televido ĉiutage pritraktas ĝin. Eksterlande manpleno da fakuloj interesiĝas.





Vendisto plus librotenisto

Jo Lernout (52) [lernouŭt] laboris ĉe pluraj internaciaj kompanioj, laste ĉe la belga filio de usona

Wang, siatempe grava produktanto de tekstprilaboraj sistemoj. Pol Hauspie (49) [haŭspi] transprenis la librotenan oficejon de sia patro kaj kompletigis ĝin projektante komputilajn programojn por librotenado.

Ambaŭ devenas el kaj daŭre loĝas en iom fora, okcidenta, flandra parto de Belgio, apud limo de Francio. Ili ambaŭ, kvankam el malsamaj vidpunktoj, havas sciojn pri ebloj kaj bezonoj de la komputila fako. Laŭkaraktere unu kompletigas la alian. En 1987 ili fondis, kun kelkaj amikoj, kompanion kiu





Lernout kaj Hauspie havis tri prioritatojn: diĝita parolregistrado, parolantaj komputiloj kaj parolrekono.

okupiĝu pri parol- kaj lingvo-teknologio. En 1989 la kompanio ricevis la nunan nomon *Lernout & Hauspie Speech Products*, mallongigite *L&H* aŭ *LHSP*.

Malfacila starto

La fondintoj ne mem havis scion pri tiaj produktoj. Ili aĉetis la varojn eksterlande kaj distribuis ilin en Eŭropo. L&H ankaŭ dungis specialistojn por perfektigi kaj plilarĝigi la gamon kaj evoluigis ĝis praktika uzebleco la rezultojn kiujn atingis esploristoj de belgaj universitatoj.

Mankis vera strategio, ĝis L&H difinis tri prioritatojn: diĝita registrado de parolo, teksto-al-parolo (ekzemple komputilo kiu parolas), kaj parolrekono (ekzemple komputilo kiu aŭskultas kaj plenumas ordonojn de la uzanto). La unuaj produktoj ja funkciis, sed ne havis la esperatan kvaliton. La vendoj restis modestaj kaj L&H pluvivis danke al la talento de Jo Lernout kaj Pol Hauspie por konvinki investkompaniojn kaj lokajn bonhavulojn pri la estontaj sukcesoj.

Turnopunkto venis en 1992, kiam la tiama flandra ĉefministro, Luc Van den Brande, konvinkis (aŭ premis) GIMV, la investkompanion de la flandra registaro, finance subteni L&H. Ekde tiam, L&H povis daŭre fidi je influhavaj politikistoj por realigi siajn projektojn.

Intertempe L&H adaptis sian strategion: ĝi estonte nur okupiĝos pri evoluigo de la baza teknologio kaj vendos licencojn al aliaj kompanioj kiuj projektu la produktojn por konsumantoj. Tiu taktiko alportis novajn enspezojn, sed ne sufiĉis por povi ekspansii.

Kvin gloraj jaroj

Ĉirkaŭ 1995 pluraj eŭropaj kompanioj sukcesis negocigi siajn akciojn en

la usona akcio-borso *Nasdaq*. Ekde la 1a de decembro 1995 ankaŭ la L&H-akcioj estis kvotataj tie. Estis tuja sukceso kaj tio konfirmis la internaciigon de L&H. Samtempe ekstis la daŭra kaj multekosta dependeco de investbankoj, revizoroj kaj juristoj.

Ĉiuj problemoj forvaporigis. La vendocifero kreskis kaj venis pliaj emisioj de akcioj, kies valo-

ro plurobligis. Fruaj investantoj finfine povis reakiri sian kapitalon kun bela profito. La fina venko okazis kiam ankaŭ Microsoft akiris L&H-akciojn kaj promesis integri la L&H-produktojn en sian mastruman sistemon.

En la komencaj jaroj bankoj estis rifuzemaj pri helpo, sed ekde kiam L&H havis sufiĉe da monrimedoj, bankistoj volonte rendevuis kun L&H. Baza regulo de bankistoj ja estas pruntedoni monon nur al personoj kiuj ne bezonas.

Venis novaj oficejoj je la rando de urbeto leper, estis kreitaj filioj en- kaj eksterlande, estis aĉetitaj tradukoficejoj kaj kompanioj kun konkurenca teknologio... En la printempo de la jaro 2000 la valoro de L&H-akcio estis la 25-oblo de la valoro en 1995. Laŭ bursa valoro ĝi estis la kvina entrepreno de Belgio.


Komence de la jaro 2000 L&H faris du grandajn – kiel poste evidentiĝis fatalajn – aĉetojn en Usono. La unua estis *Dragon*, la ĉefa konkuranto. Dua es-

tis *Dictaphone*. Tiu lasta ne vere estis sana entrepreno, sed ĝi dominis la usonan merkaton de dikto-aparatoj. Se oni povus konvinki la klientojn de *Dictaphone* forĵeti siajn surbendigilojn kaj anstataŭe instali L&H-produktojn en siaj komputiloj, malfermiĝus senfina merkato. La aĉetojn volonte kaj sengarantie financis grupo de kvin bankoj (belgaj *Artesia*, *Fortis* kaj *KBC*, germanaj *Deutsche Bank* kaj *Dresdner Bank*) per kredo de proksimume 500 milionoj da usonaj dolaroj.

Usona gazeto malfidas

Dum la somero kelkaj ĵurnalistoj de la eŭropa eldono de la usona financa gazeto *Wall Street Journal* (WSJ) esploris la bilancojn de la L&H-grupo, ekspansiinta ĝis labirinto en kiu eĉ la fondintoj perdiĝas. Ili trovis, ke iuj ciferoj en la diversaj bilancoj ne kongruas. Ili vizitis la L&H-filiojn en Singapuro kaj Koreio kaj konstatis, ke tiuj filioj estas malfacile aŭ tute ne troveblaj. Al la negativaj raportoj en WSJ, L&H kaj ĝia ĉefa revizoro, KPMG, reagis per indigno: estis mensogoj, konkurantoj misuzis WSJ por fifamigi L&H, ktp. Mallonge poste estis registritaj novaj versioj de la bilancoj, kio pruvas ke tamen enestis eraroj.

Ekde tiam venis unu katastrofa novaĵo post la alia: dubaj transakcioj inter la filioj, malapero (ŝtelo?) de grandegaj sumoj en Koreio, falo de la vendosumo, malbonaj rezultoj de *Dictaphone*, bankkreditoj kiuj baldaŭ atingos sian limdaton ... En Belgio kaj Usono ankaŭ oficialaj instancoj komencis ekzameni la procedurojn ĉe L&H.



Luc Van den Brande, la flandra ĉefministro, zorgis pri la necesaj investantoj por povi ekspansii.

► La iamaj amikoj distanciĝis. La ĉefa politika subtenanto, Luc Van den Brande, ne plu estas flandra ĉefministro. Estroj de Artesia kaj KBC deklaris en intervjuoj ke ili sentas sin trompitaj (kvankam la bilancoj kiujn vidis WSJ estas alireblaj por ĉiuj, certe por la bankoj). La L&H-akcioj ne plu estas borse vendeblaj. Nur obskuraj negocistoj okupiĝas pri ili.

Ĉu L&H estas savebla?

Estas du eblaj solvoj, sed ambaŭ estos ege komplikaj. L&H havas ĉefsidejojn en Belgio kaj Usono kaj la juraj proceduroj malsamas. Ne ekzistas iu supernacia sistemo por harmoniigi la procedurojn en la du landoj.

Unua solvo estas simpla bankroto: juĝisto finas la aktivecon de la kompanio kaj kuratoro vendas la valorajn erojn (tradukoficejojn, licencojn ...) al interesitoj; per la enspezoj oni unue repagas la prioritatajn kreditorojn: impostojn, socian asekuron, dungitojn ... Kio restas estas proporcie distribuata inter la ceteraj kreditoroj, i.a. la bankoj. Por la akciuloj kutime nenio restas.

Dua solvo celas resanigi la entreprenon. En multaj eŭropaj landoj oni nomas tiun proceduron *konkordato*. La usonaj esprimoj estas *bankruptcy protection* (protekto kontraŭ bankroto) aŭ *Chapter 11*. Juĝisto blokas dum iu periodo (kelkaj monatoj ĝis kelkaj jaroj) ĉiujn ŝuldojn por ke la entrepreno povu restrukturi sin, sen esti ĝenata de juraj proceduroj. Kutime kreditoroj rezignas pri parto de siaj pruntoj. Post la restrukturado kaj sanigo, la entrepreno denove memstare funkcias.

La advokatoj de L&H petis la resanigan proceduron. La usona juĝisto konsentis pri proceduro por protekto kontraŭ bankroto. La belga juĝisto la 8an de decembro 2000 rifuzis konkordaton, ĉar evidentiĝis ke L&H mem ne plu konas sian financon. Jam de kelkaj monatoj revizoroj rekontrolas la librotendon de L&H, sed daŭre mankas konkludoj. Kelkajn tagojn poste la juĝisto nomumis tri kuratorojn kiuj, ĝis la definitiva decido pri konkordato aŭ bankroto, zorgu ke ne estas aktivaĵoj kaŝe vendataj.

Materialo por krimromano

Teorio, kiu jam cirkulis en malgranda rondo, antaŭ kelkaj tagoj aperis en la gazetaro: la usonaj sekretaj servoj kulpas pri la problemoj de L&H. Komprenoble usonanoj ne ŝatis, ke eŭropa entrepreneto aĉetas gravajn usonajn firmaojn. Akiron de Dictaphone oni ankoraŭ povis toleri, sed Dragon estis alia afero.

Laŭdire Dragon sufiĉe intime kunlaboris kun la usonaj sekretaj servoj por klopodi aŭtomate traduki ŝtele kopiitajn mesaĝojn (telefonajn kaj retajn) en malbone konataj lingvoj, ekzemple de teroristoj aŭ de drogotrafikantoj. Ke la scio akirita de Dragon estas kontrolata de eksterlanda grupo por Usono estas tute neakceptebla. Tial oni aranĝis ke usona juĝisto per *Chapter 11*-proceduro savos la usonan parton de L&H, dum en Belgio neeviteblis bankroto. Tiel la L&H-teknologio iĝos usona kaj malaperos ĝena konkuranto ...

Roland ROTSAERT

ĈINIO

Esperiga estonto

La ĉina mediprotekta industrio nur ekformiĝis antaŭ iom pli ol dek jaroj. Kvankam ĝis nun ĝi estas etskala, ĝi jam iĝis unu el la plej rapide disvolviĝantaj novtipaj industrioj. Oni antaŭkalkulis, ke en 2000 ĝia produktovaloro atingos pli ol 100 miliardojn da juanoj. Dum la venontaj jardekoj, tiu cifero kreskos meznombre po 15 ĝis 20 % jare.

Nuntempe la jara produktovaloro de la mediprotekta industrio reprezentas nur 1 % de tiu de la tutmonda sambranĉa industrio. Landinterne la vendosumo estas 30 miliardoj da juanoj kaj ankaŭ ne superas 1 % de la malneta nacia produkto. La maŝinindustria parto de la ĉina mediprotekta sektoro teknike ankoraŭ restas sur tre malalta nivelo. Malpli ol 4 % de ĝiaj produktaĵoj alproksimiĝas al la internacia nivelo. Tamen, ĝi certe povos iĝi nova kreskopunkto de la ĉina ekonomio.

En 1998 la ŝtato emisiis obligacian prunton de 200 miliardoj da juanoj por financi medireguladon. Por akiri financon helpon, pluraj provincoj kaj municipoj entute prezentis al la ŝtato 1647 konstruprojektojn por protekti la medion kontraŭ poluado. El tiuj, 200 grandaj projektoj estis aprobitaj, kun valoro de pli ol 50 miliardoj da juanoj. La projektoj glate iras kaj kelkaj el ili jam kompletigis. MU Binghua

BALKANIO

Pliigita aktivado de LUKoil

En la kulmino de la preza ŝoko en la merkato de kruda petrolo, la rusa kompanio LUKoil komunikis, ke ĝi intencas plivastigi sian agadon en Balkanio per aĉeto de la rafinejo en Novi Sad, Jugoslavio. Verŝajne LUKoil komplete rekonstruos ĝin pro la damaĝoj rezulte de la bombado fare de NATO-aviadiloj dum la Kosovo-krizo en 1999.

La rusa petrolgiganto estas optimisto rilate la regulajn liverojn de krudaĵoj al Jugoslavio post la fino de la embargo. Ĝis nun LUKoil agadis en la jugoslava merkato per liverado al privataj klientoj de produktaĵoj el la rafinejo Neftohim en Burgas, Bulgario, aĉetita fine de 1999. La intenco de la rusa kompanio estas eniri ankaŭ la merkaton de Kroatio per la estigo de komuna kompanio kun INA Nafta Industria.

Dum la jaro 2000 estis investitaj en bazaj riparlaboroj kaj modernigoj de la instalaĵoj de Neftohim-Burgas 35 milionoj

da usonaj dolaroj (USD). Ties profito por la unuaj ses monatoj de la jaro estas proksimume 10 milionoj da USD. LUKoil planas ĝis 2005 estigi en Bulgario distribuan reton de 150 benzinstacioj. En la jaro 2000 por tio estis apartigitaj 21 milionoj da USD. Ĝis nun estis nur ses LUKoil-benzinstacioj en Bulgario.

Krom la rafinejo en Burgas, la rusa kompanio posedas la rafinejon en Ploiești, Rumanio. En ĝi ĝis nun estas investitaj 11 milionoj da USD, kaj la planitaj investoj ĝis 2003 faras totalon de 200 milionoj da USD. La ambicio de




la rusa giganto estas komenci intertraktojn kun la rumanaj instancoj pri eventuala transportado de prilaborita petrolo ĝis Okcidenta Eŭropo laŭ rivero Danubo. LUKoil havas ankaŭ kelkajn rafinejojn en Montenegro, samkiel unu en Odesa, Ukrainio.

La estraro de la kompanio ne kaŝas siajn ambiciojn en Balkanio por plua aktivado ankaŭ en la greka, turka kaj makedona merkatoj.

LUKoil havas po tri funkciajn miksaĵajn entreprenojn en Kazahio kaj Azerbajĝano. Krome ĝi ekspluatas trovejojn de kruda petrolo en Irako kaj Egiptio. Evgeni GEORGIEV

Nova sistemo por instrui la internacian lingvon



Mendu la PAL-version ĉe:
Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen
Tel: +32 3 234 34 00
Reto: butiko@fel.esperanto.be

Prezo de lecionoj 1 ĝis 4:
81 EUR + afranko
Prezo de lecionoj 5 ĝis 8:
81 EUR + afranko

ESPERANTO PASPORTO AL LA TUTA MONDO

Ĉu tute nova sistemo por instrui la internacian lingvon? Efektive. Vi ja estas preta ekaventuri en la lernadon de Esperanto. Tamen, ne domaĝu kelkajn minutojn por rigardi la mapon. Tiel vi komprenos la vojon kiun sekvos via lernado kaj kiel vi laŭiros ĝin.

Jam de la komenco vi plene trempiĝos en la lingvo. Ne timu, tamen, vi ne dronos! Ĉio subtenos vian komprenon dum vi konatiĝos kun la sono kaj uzado de la lingvo. Esperanto havas apartajn avantaĝojn kompare kun la tasko kiu frontas lernantojn de aliaj lingvoj. Ĉar ne ekzistas neregulaj formoj kaj esceptoj, tiuj ne brem-

sas la disvolvon de lingvaj intuicioj. Dum vi rigardos la lecionojn, vi ekhavigos ĉiam pli kaj pli da memfido pri tio kion vi lernas. Ĉiufoje vi komprenos pli el la kunteksto de la materialo prezentita. Memoru ke plej gravas lasi la materialon enflui sen ĉagreniĝo pro tio ke vi ne tuj komprenas la tuton. Vi konstatos la rezultojn kiam vi donos al vi okazojn por praktiki kaj uzi la lingvon. Ni nun vidu kiel kaj kial ĝi funkcios por vi...

Prof. Duncan Charters

Prezidinto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

EDUKADO

Studentoj universitaton soifantaj




Malsame ol en multaj aliaj eŭropaj landoj, belgaj abiturientoj ricevas diplomon de meza lernejo ne post komuna, tutnacia taksado sed surbaze de ekzamenaj poentoj deciditaj ĉefe de siaj kutimaj instruistoj. Rezulte: ĉiuj abiturientoj ricevas identan mezlernejan diplomon, kies vera valoro tre varias.

Alia sekvo estas, ke multaj studentoj, kiuj komencas universitan karieron, dum la unua jaro malsukcesas. Tio kostas multe kaj al la socio kaj al la memfido de malsukcesintoj. Facile kompreneblas, ke la registaro aŭ la universitatoj daŭre klopodos limigi tiun perdon kaj fincan kaj emocian.

Fidinda mezurilo

En la universitato de Loveno – la plej malnova de Belgio – oni kredas, ke la problemo estas nun solvita. Doktoriganto ellaboris teston por aŭguri, ĉu abiturientoj kapablos sukcese



Tutŝtata taksado mankas.

eniri universitan studfakon. En 1997 partoprenis la teston 1500 abiturientoj. Post unu jaro la doktoriĝanto rekontaktis partoprenintojn por konstati, kiel ili sukcesis en siaj universitataj studoj. Evidentiĝis, ke 92 % de tiuj, kiuj malbone plenumis la teston, malsukcesis ankaŭ ĉe la universitato. La iniciatinto de la projekto taksas la teston fidinda mezurilo de estontaj rezultoj.

Estontaj abiturientoj faros la teston post la kristnaskaj ferioj: pro tio ĝi nomiĝas „Ĥrisostomo” laŭ la sanktulo, kies festo koincidas kun la komenciĝo de la lastaj 100 tagoj de mezlerneja kariero. La testo mem konsistas el matematikaj kaj lingvaj eroj, inkluzive de kompreno de scienca teksto.

Nacia regulado

Tamen estas nekonsekvencaĵo. Ĝis nun en belga edukado mankas preskaŭ ĉiu nacia regulado. Malgraŭ reguloj pri instruendaj fakoj kaj ties enhavo, ĉiu lernejo, eĉ ĉiu instruisto povas plejparte memstare decidi, kiel realigi la regulojn: ekzemple, instruistoj sendepende preparas finajn ekzamenojn. Malfacile estas kompari lernejojn kaj diplomojn.

Pro lerneja libereco la nova testo ne fariĝos tuj deviga en ĉiu lernejo. Plue, la ministro pri edukado atentigis, ke la testo perdos sian valoron, se lernejoj organizos siajn programojn aparte, por ke studentoj sukcese trapasu

la teston. La ministro same rimarkigis, ke kvankam multaj gestudentoj – pli malpli 50 % – malsukcesas dum la unua studjaro, ili tamen atingas altlernejan aŭ universitan diplomon. Do, ne kulpas la instruado; kulpas la sistemo por elekti taŭgan fakon.

Socia medio

Eble la testo ankaŭ pretervidas la „socian” preparadon de estontaj civitanoj. Gravas ne nur lernejoj kaj intelektaj preparado, sed ankaŭ socia medio. Lernejoj, kies gepatroj mem ĝuis universitan edukadon, aŭ kiuj moviĝas en intelektulaj rondoj, pli bone povas sin prepari, ĉar ili komprenas la universitan ĵargonon. Ili estas mense stirataj ĝis la universitato: helpo, aŭ antaŭpreparo, kiu mankas al tiuj, kiuj ne povas ĉerpi el tiaj fontoj.

Tiun lastan aserton okulfrape pravigas alia studo pri universitata instruado. Evidentiĝas, ke daŭre ekzistas abismo inter diversaj klasoj koncerne universitan edukadon. Universitataj pordoj restas baritaj por idoj de laboristoj kaj infanoj el socie pli malaltaj tavoloj. Ĉefa kialo: tro alta kosto. Sendube ankaŭ respondecas la fakto, ke ili mem taksas sian sukceskapablon tro malalta. Malsukceso elteneblas nur por tiuj, kiuj havas plenan monujon. La aliaj devas elekti malpli riskajn elirpunktojn por la estonta vivo.

Guido VAN DAMME

Prefere pakete

En aviado gravan rolon por sekureco ludas la komunikado inter regturo kaj aviadilo. Ĝi okazas parole kaj laŭ sistemo, kiu ne multe diverĝas de normala publika radistacia dissendado. Temas pri telefona radiofonio.


La suma efiko de tia sistemo estas komparebla kun situacio, kiam oni volas aŭskulti la vortojn de amiko en drinkejo, kie ankaŭ multaj aliaj personaj parolas. Evidente, se pluraj personoj samdirekte samdistance samlaŭte parolas, oni havos problemon aŭskulti la vortojn de nur unu persono.

Io tre simila okazas, se la pilotoj de pluraj aviadiloj hazarde decidas samtempe komuni-ki kun la regturo. Ili reciproke ĝenas sin. Same stas ekzemple ĉe la publikaj dissendadoj en la mezonda zono. Vespere oni ĉi-zone aŭdas ne plu malnodeblan miksaĵon el pluraj stacioj, kiuj dissendas samhore per la sama frekvenco.

Sed en radiofonia medio tio ne nepre estas tiel. Povas ĉe kelkaj radiofoniaj sistemoj ankaŭ estiĝi, anstataŭ kakofonio, pura silento. Rilate aviadon ĉi-okaze piloto tute ne povas scii, ke li maltrafis ordonon de la regturo. Nur la registro mem povos konjekti tion, rimarkante, ke la piloto aŭ tute ne respondis, aŭ dum la plua konversacio respondas iel nelogike. La sola kontrolinstanco certiganta, ke konversacioj nek perdiĝis nek tordiĝis, estas la konversacianoj mem. Teĥnike tia komunikado estas jam principe neseкура.

Problemo solvebla

Alie stas pri „paketa” radiofonio. Jen dudirekta sistemo, kiun oni uzas por transporti datumojn. Ĝi estas komparebla kun faksado. Se oni volas sendi iom pli longan faksajon – ekzemple 10-paĝan – oni – ne tute malprave – ege malfidas sian faksilon. Por certigi, ke la afero funkciu, oni numeras ĉiun sendotan paĝon de unu ĝis dek kaj aldonas



Komunikado inter regturo kaj aviadilo okazas per telefona radiofonio, malnova kaj tre neseкура tekniko.

specialan frontpaĝon, kiu deklaras, ke sekvas 10 paĝoj.

Se nun dum la faksado, io meze misfunkcias, la ricevanto povos tuj rimarki, ke iu el la promesitaj paĝoj ne alvenis, aŭ simple ke la faksado ne ĝisfine sukcesis. Ĉi-okaze oni povos telefoni al la sendinto kaj peti, ke tiu denove sendu la paĝojn nericevitajn aŭ iel fuŝitajn.

Tre simile stas pri la paketa radiofonio. Ĉiu paketo ricevas numeron. Se nun paketo ne alvenas, aŭ pluraj paketoj eĉ alvenas en malĝusta vicordo, aŭ iuj paketoj koliziis kun la paketoj de tute

alia komunikado, la ricevilo povas baze de la kunsenditaj paketonumeroj reordigi la tuton aŭ laŭnecese peti pri la resendo de ĉio, kio iel survoje perdiĝis aŭ mutiĝis. Alivorte la elementoj de la komunikada sistemo mem rimarkos, ke io mankas, kaj povos aŭtomate eklanĉi ĉiujn necesiĝintajn resendadojn. Tia komunikado estas principe sekura.

Paketo ĉe ĉio ĉi estas simple ujo por datumoj. Datumoj – de nefakula vidpunkto – povas esti la literoj de teksto aŭ eble iuj ciferoj, sed eblas ankaŭ turni homan paroladon en fluon de ciferecaj datumoj. Ĝuste tio okazas en ĉiu poŝtelefono. La poŝtelefona reto mem transportas nur datumojn kaj tute ne la paroladon mem en la formo, kiel ĝi alvenas de la mikrofono. Ĉar ĉe tio ĉiu transportpaketo ricevas numeron, poŝtelefona reto povas tuj ekkoni, se paketo perdiĝis.

Unubate kvincentopon

Estas klare, ke ĝuste en tiom riska afero kiel aviado, la komunikado inter regturo kaj aviadiloj estu laŭpove sekura. Bedaŭrinde oni plu uzas malnovan nesekuran telefonan radiofonion kaj ankoraŭ ne transmigris al la pli sekura paketbaza datuma radiofonio. Aldona avantaĝo de la pli moderna paketa radiofonio estas la eblo samtempe transsendi skribajn mesaĝojn – ekzemple oficialan permeson ekdeteriĝi aŭ flugi je alia alto. Per tia sistemo same eblas ŝalti iujn signallampojn por la piloto, kvaŭzaŭ trafikana semaforon, do ege pli sekura sistemo permesi aŭ malpermesi aviadilon flughavene starti, ol simple paroli kun la piloto.

Fine estas almenaŭ teĥnike imageble, ke oni urĝokaze telestirus la tutan aviadilon por rekte de la regturo malhelpi specifan mismanovron.

Evidente por tia transmigrado oni devus reekipi ĉiujn flughavenojn kaj ĉiujn flugmaŝinojn, kio kostus monon vere nemalmultan. Aliflanke resti ĉe la malnova sistemo fronte al la hodiaŭa senĉese kreskanta flugtrafika denso kaj la el tiu rezultanta danĝero de koliziantaj samsekundaj telefon-radiaj komunikadoj inter pilotoj kaj registoj kostos – iam kaj iam – homvivojn. Foje unubate eĉ tutan kvincentopon kiel tiam en Tenerifo en la jaro 1977a.

PEJNO Simono

Ne mortis mortiga malsano

Malsano de moderna japana socio estas tuberkulozo. Lastatempe oni raportis pri diversaj kazoj, ekzemple: en urbo Hukuoka 44-jaraĝa instruisto infektiis 102 lernantojn. En gubernio Sizuoka oni ekzamenis 400 homojn pro kontakto kun lerneja kuracisto, kiu mortis pro antibiotik-rezista tuberkulozo.

Unuaj statistikoj indikas, ke en 1883 mortis pro tuberkulozo 13 803 homoj. Jaron post jaro la nombro kreskis ĝis 171 473 en 1943. Tiu ĉi nombro estis la plej granda en japana historio. Inter 1935 kaj 1950 tuberkulozo okupis la unuan lokon inter kaŭzoj de morto.

Viktimoj

Tuberkulozo spegulas la progreson de industrio. Pro modernigo de Japanio gejunuloj el kamparaj vilaĝoj eklaboris en urboj sub tre malfavoraj kondiĉoj. Ili facile fariĝis viktimoj de tuber-



Tuberkulozo ankoraŭ ne mortis en Japanio.

kulozo kaj tiam revenis al siaj vilaĝoj, tiel disvastigante la malsanon.

Dum la 60aj jaroj, pro imuniga programo, tuberkulozo ne plu mortigis kaj oni forgesis ties danĝerojn. Tamen tuberkulozo mem ne mortis, kaj en 1998 tuberkulozoj multiĝis ĝis 40 000. La registaro taksas la situacion „danĝera”. Laŭ fakulo: „Oni ne forgesu, ke tuberkulozo estas socia malsano. Por vere konkeri ĝin, nepras batali kontraŭ malriĉeco.”

HORI Jasuo/pg

REAGO

Ne tiom negative ...

Irlanda leganto riproĉis min pro miaj raportoj pri mistrakto de eksterlandanoj en la Irlanda Respubliko. La leganto asertas, ke mi donas misan impreson, ke irlandanoj estas rasismaj kaj ksenofobaj. Mi konsentas, ke mi eble tro emfazis negativajn reagojn rilate fremdulojn. Mi pretas kredi, ke rasismaj atakoj okazas malpli en Irlando ol en kelkaj aliaj eŭropaj landoj. Laŭ mia sperto, irlandanoj estas plejparte afablaj kaj gastamaj. Multaj ordinaraj irlandanoj estas sincere kaj profunde homaramaj.

Oni povus mencii, ekzemple, dublinan buskondukiston Tom Hyland [hajland], kiu iniciatis kampanjon por helpi la popolon de Orienta Timoro, kaj

dommastruminon Edie Roche [idi roĉ], kiu dediĉis sian vivon al belorusaj infanoj malsanigitaj pro la nuklea katastrofo en Ĉernobilo. Tiaj homoj abundas en la Verda Insulo.

Tamen la malagrablaĵoj kaj atakoj, kiujn mi menciis, vere okazis – kaj sekvis pliaj. Pakistanaj kuracistoj, laborantaj en urbo Nenagh [nina], estas insultitaj en trinkejo: la nazo de unu estis rompita. Alia grupo el Pakistano – ĉi-foje komercistoj kun validaj vizoj – estis malliberigita dum tuta semajno, ĉar oni senbaze kredis ilin kontraŭleĝaj enmigrantoj. Feliĉe, la plimulto da irlandanoj ne montras similan paranojon en siaj rilatoj kun eksterlandanoj kaj ĉi tion mi volonte reemfazas.

Garbhan MACAOIDH

Tradicio sigelita

Anstataŭ permene subskribi japanoj ofte uzas sigelilon. Sen sigelilo japanoj ne povas vivi: fakte, oni bezonas diversajn. Malmultekostajn sigelilojn oni facile aĉetas en butikoj. Sigelon tian oni uzas ekzemple por atesti, ke oni ricevis pak-aĵon, aŭ por ricevi dokumentojn ĉe la urbodomo. Posedi tian malmultekostan sigelilon vere ne pruvas identecon: la tradicio tamen daŭras.



Malmultekosta sigelilo.

Por poŝtoŝtampoj kaj bankoj oni uzas pli multekostan sigelilon. Efektive, por ricevi monon, oni devas uzi registritan sigelilon. Malfacile estas



Pli kosta sigelilo.

kaze de perdo registri novan. Ekzistas ankaŭ identiga sigelilo registrita ĉe la urbodomo. Tiu ĉi sigelilo tiom gravas, ke japanoj kaŝas ĝin en siaj hejmoj. Aĉetonte aŭ vendonte domon aŭ terenon, ekzemple, oni bezonas identigan sigelilon.

Kaligrafajo

Ankaŭ kompanioj, oficejoj kaj lernejoj posedas siajn identigajn sigelilojn. La sigelilon oni uzas por oficialaj doku-



Identiga sigelilo.

mentoj. Se la nomo de la entreprenno ŝanĝiĝas, ŝanĝiĝas ankaŭ la sigelilo. Belartan sigelilon oni uzas por identigi ekzemple tradician pentraĵon aŭ kaligrafajon. Krei tian sigelon estas aparta arto.

Emocia afero estas por japanoj, kiuj uzis sigelilon, kiam ili vidas la orang-koloran inkon – en antaŭaj tempoj oni uzis sangon – sur dokumento. Kvankam kelkaj rekomendas, ke oni uzu eŭropecan subskribon, la sigelo-tradicio plej verŝajne neniam malaperos.



Belarta sigelilo.

HORI Jasuo/pg

Ĉu beno aŭ malbeno?

Ĉie oni vidas kaj aŭdas homojn parolantaj per portebaj telefonoj. En Japanio troviĝas 50 milionoj da poŝtelefonoj, kio signifas, ke ĉiu dua japano posedas tian aparaton. Multaj diras, ke ili ne povas vivi sen ĝi.

Portebaj telefonoj malbone efikas sur fiksitajn, publikajn aparatojn. En 1995 japanoj faris 8,7 miliardojn da telefonvokoj per publikaj aparatoj: en 1999 nur 2,9 miliardojn. Tio signifas deficiton de 56,3 miliardoj da jenoj por la japana telefon-kompanio NTT, kiu komencis malmunti publikajn telefonojn. Antaŭ 100 jaroj ekfunkciis publikaj telefonoj en Tokio, sed nun ili ekmalaperas.

Portebaj telefonoj rimarkinde influas la vivon. Mankas al nunaj gejunuloj sperto grupe ludi: ili malfacile rilatas kun aliaj homoj. Helpas portebaj telefonoj, per kiuj ili serĉas kunludontojn, sendas mesaĝojn kaj ofte senĉese parolas. Tamen telefonoj tiaj tentas gejunulojn sekrete kontakti amikojn sen scio de la gepatroj. Laŭ enketo en 1999 unu el kvar altlernejanoj (15-17 jaraj) seksumis: tiuj, kiuj pose-

das poŝtelefonon, pli aventurumas ol neposedantoj.

Sekrete paroli

Kiam oni posedis familie nur unu telefonon, la aparato troviĝis en komuna ĉambro. Familianoj ne povis sekrete paroli. Tiam gepatroj sciis, kun kiu kaj pri kio parolis la gefiloj. Nuntempe oni ne povas tiel kontroli konversaciojn de gejunuloj. Sed ne nur junaj homoj profitas de la fleksebleco de portebaj telefonoj: ŝajnas, ke pro la eblo private telefoni kreskas adulto. Same krimoj: krimulo aĉetas porteban telefonon, uzas ĝin dum monato kaj poste forĵetas ĝin, tiel ke la polico apenaŭ povas esplori.

Telefono proksimigis homojn. Ĉu tamen ankaŭ la portebla telefono proksimigas homojn? Eble ne: efektive ĝi

povas disigi homojn, aparte familiojn. Por laboristoj ĝi povas esti ŝnuro liganta onin 24 horojn tage al laborejo. Por junaj kaj pli maljunaj homoj ĝi povas ebligi eksterfamiliajn rilatojn. Ankaŭ krimulojn ĝi povas forŝiri for de la familia hejmo.

HORI Jasuo/pg



Poŝtelefonoj rapide konkeras la mondon.

SVISIO

Invadas la angla

La angla iom post iom gajnas teron en Svisio kaj estas granda risko, ke morgaŭ ĝi fariĝos la ĉefa komunikilo inter la diversaj popoloj de la lando.

Estas en Svisio kvar lingvaj komunumoj, kaj tri oficialaj lingvoj: la germana, la franca kaj la itala. Ĝis nun, pro nacia kunteniĝo, ĉiu lernejo laŭleĝe unue lernas la plej gravan nacian lingvon (post la propra) antaŭ ol eklerni la anglan. Sed nun tiu ĉi regulo estas serioze pridiskutata. Ĉu ne plej bone enkonduki la anglan kiel unuan fremdan lingvon pro utileco kaj por havi unu lingvan komunikilon inter ĉiuj?

Politika afero

Jam en Zuriko la kantona registaro decidis ekstudigi la anglan en la elementa lernejo, t.e. antaŭ la franca, kaj aliloke oni pripensas la ideon. La kantonj estas suverenaj kaj rajtas reformi sian lernejsistemon konforme al lokaj bezonoj kaj deziroj, konsiderante nek landan kunteniĝon, kiu estas ege politika afero, nek opiniojn de aliaj kantonj. Cetere la loĝantaro grandparte ne kontraŭas tian antaŭenigon de la angla.

Tamen ekzistas risko, ke la angla fariĝos la plej grava lingvo de Svisio. Eĉ nun, ĝi estas oftege elektata i.a. por malaltigi la kostojn de tri-lingva reklamo-kampanjo. Tiu foje problemas pro la malfacilo ludi kun vortoj aŭ diferencoj inter idiotismoj kaj kulturaĵoj: ekz. rano estas simbolo de veterprognozo en la germana, tamen ne en la franca kaj la itala.

Eĉ oficialaj registaraj kampanjoj informas per la angla, ekz. „No drink, no drugs, no problem” (nenia alkoholo, nenia narkotaĵo, nenia problemo). Por esti laŭmoda kaj por kapti la atenton de la junularo, oni nepre esprimas ideojn en la ekonomie potenca lingvo usona.

Konsumproduktoj

Aldone pligrandiĝas la nombro de konsumproduktoj portantaj anglajn nomojn. Klare, oni vere bezonas tian interlingvon en lando, kie ĉiu pakaĵo, ĉiu etikedo donu uzklarigojn kaj listigu ingrediencojn en almenaŭ du, tamen ofte ĉiuj tri oficialaj lingvoj. Apenaŭ restas spaco por alloga – aĉetprovoka – foto aŭ desegnaĵo.

En Romandio kaj en Tiĉino elverŝas oleon sur la fajron la fakto, ke alemanoj kutime ne esprimas sin per la sama germana, kiun kunlandanoj trudstudas en la lernejo. Ili parolas diversajn dialektojn kaj ofte mem preferas paroli kun ne-dialektanoj alian fremdan lingvon, anstataŭ paroli la germanan, kiun ankaŭ ili trovas malfacila.

Marteno ECOTT



Historio de la ekonomika pensado

Parto 1

Enkonduko

Por bone kompreni la funkciadon de la nuna tutmonda ekonomia sistemo, necesas konsideri ke ĝi havas sian originon en Eŭropo kaj ke la baza idearo havas historion de tri jarmiloj.

Pri tiu historio Bo Sandelin, Hans-Michael Trautwein kaj Richard Wundrak verkis svedlingvan libron, aperintan unuafoje en 1995 kaj destinitan al iom faka publiko.

Esperanta libroversio titolita „La historio de ekonomika pensado” estos eldonita printempe de la germana eldonejo Leins Verlag. Tiun tekston Bo Sandelin nun mallongigis por la MONATO-legantoj. La fakaj terminoj kutime apartenas al la ĉiutaga lingvaĵo aŭ estas klarigitaj en la teksto. Se ne, estas aldonita difino, plej ofte transprenita el la Internacia Komerca-Ekonomika Vortaro (IKEV).

Roland ROTSAERT

Antaŭmerkantilisma ekonomia pensado

Dum sia tuta historio la homo faris ekonomiajn decidojn. Skribaj dokumentoj pri homa ekonomia pensado ekzistas por periodo de iom pli ol 2000 jaroj. Per la antaŭmerkantilisma ekonomia – aŭ eĉ ekonomika – pensado ni celas la skribe dokumentitan pensadon antaŭ proksimume la 16a jarcento p.K..

Aŭtoroj kiel Adam Smith kaj aliaj klasikuloj en la 18a kaj 19a jarcentoj legis la fruepokajn aŭtorojn. Ili transigis kelkajn ideojn, kiujn transprenis nia generacio, kaj ili forĵetis aliajn. Tial estas motive iom orientiĝi pri la ekonomia rezonado de antikvaj aŭtoroj, la biblio kaj la skolastikuloj.

Labordivido laŭ helenaj filozofoj

Plurajn ankoraŭ aktualajn ekonomikajn konceptojn kaj principojn ni trovas ĉe antikvaj aŭtoroj kiel Platono (427-347 a.K.), Aristotelo (384-322 a.K.) kaj Ksenofono (ĉ. 428-354 a.K.). Ili skribas pri, interalie, labordivido kaj specialiĝo, mono, interŝanĝo, valoro, egoismo, privata kaj publika administrado.

En la dialogo *Ŝtato* Platono priskribas kiel socio disvolviĝas kun rigora



Ideoj de Adam Smith kaj aliaj influis nian generacion.

labordivido, kiu kondukas al pli granda efikeco. Ni vidu:

„Ŝtato, mi komencis, estiĝas ĉar neniu homo mem sufiĉas. Ĉiu bezonas aliajn. Aŭ ĉu vi povas imagi alian kaŭzon ke ŝtato estiĝas?

Ne.

Ĉar ni do bezonas multe, kaj ĉar ni estas helpataj, jen de unu, jen de alia, por kontentigi la di-

versajn bezonojn, ni kunigas multajn amikojn kaj helpantojn en unu loko, kaj tiun lokon ni nomas ŝtato. Ĉu ne?

Certe jes.”

Poste venas diskuto pri la specifaj bezonoj de la homoj, kio rezultigas jenajn demandojn:


„Kiel la ŝtato plenumu tiujn grandajn postulojn? Ni povas supozi, ke unu persono fariĝas terkulturisto, alia domkonstruisto kaj tria teksisto, ĉu ne? Kaj eble ni aldonu ŝuiston kaj ankoraŭ iun, kiu alimaniere zorgu pri la korpaj bezonoj?”



Platono daŭrigas kaj enkondukas pli kaj pli specialigitajn taskojn en pli kaj pli grandan socion. La ekonomia mesaĝo estas ke la efikeco kreskas, se ĉiu povas okupiĝi pri sia specialaĵo, ĉar „ni ĉiuj havas malsamajn talentojn kaj taŭgas por malsamaj laboroj”.

Ksenofono prilumas alian aspekton de specialiĝo. Ofte Adam Smith estas rigardata kiel tiu, kiu atentigis nin ke la amplekso de la merkato estas decida por la grado de specialiĝo. Tamen, jam Ksenofono pritraktas la saman demandon, kaj lia ekzemplo estas tiel simila al tiu de Smith, ke estas tre probable ke ĝi estis bazo por Smith. Ksenofono skribas en *Kyru paideia* (La edukado de Kiros):

„En malgrandaj urboj unu metiisto faras seĝojn kaj pordojn kaj plugilojn kaj tablojn, kaj ofte tiu sama metiisto konstruas domojn. Kaj eĉ tiam li estas kontenta se li trovas sufiĉe da laboro por vivteni sin. ... Kontraŭe, en gran-



Plurajn ankoraŭ aktualajn ekonomikajn konceptojn kaj principojn ni trovas ĉe antikvaj aŭtoroj kiel Platono, Aristotelo (supre) kaj Ksenofono (sube).

daj urboj unu profesio – kaj ofte eĉ malpli ol tuta profesio – sufiĉas por vivteni unu personon.”

Interŝanĝo, mono kaj interezo

Koncerne interŝanĝon, monon, prezojn kaj valorojn, la pensoj ĉefe de Aristotelo en *Politiko* kaj en *Etiko* estas notitaj de la posteuloj. Kvankam oni opinias ke li havis intencon analizi, la moraleca karaktero de la teksto estas pli frapa.

Laŭ Aristotelo estas „nature” interŝanĝi unu konsumvaron kontraŭ alia konsumvaro. La amplekso de tia interŝanĝo ne transiras certajn limojn, ĉar la bezonoj de la homo estas limigitaj.

Interŝanĝoj, en kiuj mono estas uzata, ne estas naturaj. Tamen, vendi por akiri monon por povi aĉeti alian varon estas necesa formo de interŝanĝo. Pruntado de mono kontraŭ interezo estas perversa maniero akiri havaĵon, laŭ Aristotelo. Estas nature ke plantoj kaj brutoj, sed ne mono, plimultiĝas. Mono estas kreita por servi kiel interŝanĝilo, ne por plimultiĝi.

La negativan sintenon al interezo oni retrovas longan tempon poste. Oni trovas ĝin ĉe la skolastikuloj en la mezepoko, kaj ĝi longe pluvis en la romkatolika eklezio, kie interezo estis konsiderata uzuro.

Jen unu ekzemplo de la longdaŭra influo de tiu eklezia sinteno: la malpermeso de interezo laŭ la kanona juro enpenetris la svedan mezepokan juron, sed poste ĝin anstataŭis malpermeso de interezo super certa nivelo. Laŭ la leĝaro de la jaro 1734, interezo ne superu 6 procentojn. Tiun ĉi malpermeson oni en 1864 modifis kaj en 1907 tute forigis. Tamen, ĝenerala malpermeso de uzuro restas en la nuna leĝaro. Tio signifas ke pruntkontrakto povas fariĝi nevalida aŭ esti ŝanĝita, se pruntodonanto ekspluatas delikatan situacion de la pruntoprenanto por postuli maljuste altan interezon.

La biblio

Grandparte la biblio estis skribita antaŭ ol aperis la jam menciitaj grekaj filozofoj. La biblio ja temas ne ĉefe pri ekonomio, sed ĝi tamen havas ekonomiajn elementojn. Pluraj similas al tiuj, kiujn ni trovis ĉe helenaj filozofoj, ekzemple la opinio pri interezo.

La baza biblia sinteno al interezo estas negativa laŭ la malnova testamento: „Se vi pruntedonos monon al iu el Mia popolo, al iu malriĉulo apud vi, ne estu por li premanto, ne metu sur lin procentojn” (Eliro 22:25). Simile: „Ne donu



„Observu do la ordonojn kaj la leĝojn kaj la regulojn, kiujn mi ordonas al vi.”

kreskige al via frato monon, nek manĝaĵon, nek ion alian, kion oni povas doni kreskige” (Readmono 23:19). En la nova testamento ne estas eksplicita malpermeso de interezo.

Aliaj ekonomiaj eroj temas pri labormoralo: „Dum ses tagoj laboru kaj faru ĉiujn viajn aferojn; sed la sepa tago estas sabato de la Eternulo, via Dio; faru nenian laboron...” (Eliro 20:9-10, Readmono 5:13-14).

La problemo pri materia nesufiĉo rezultis el la origina peko. En la biblio tiu ĉi tipe ekonomia problemo estas solvata per diversaj metodoj, ne nur per streĉiga laboro. Unu metodo estas kredi. Ekzemple, dum la eliro el Egiptio Moseo demandas al Dio kion fari, ĉar la homoj grumbas pro manko de akvo. Dio diras, ke Moseo frapu rokon per sia bastono. Moseo frapas la rokon, li kredas ke tio helpas, kaj – vere – venas akvo el la roko (Eliro 17:1-7; kp. Nombroj 20:1-11).

Alia metodo, parenca al la unua, estas celi la regnon de Dio. Ni vidu ekzemplon de la Nova Testamento: „Tial ne zorgu, dirante: Kion ni manĝu? aŭ: Kion ni trinku? aŭ: Kion ni surmetu? ĉar pri tio serĉas la nacioj; ĉar via Patro ĉiela scias, ke vi bezonas ĉion tion. Sed celu unue Lian regnon kaj Lian justecon, kaj ĉio tio estos aldonita al vi” (Sankta Mateo 6:31-33).

Tria metodo solvi la problemon pri nesufiĉo estas obei la leĝon, kiun donis Dio: „Observu do la ordonojn kaj la leĝojn kaj la regulojn, kiujn mi ordonas al vi hodiaŭ, por plenumi ilin. Kaj pro tio, ke vi aŭskultas tiujn regulojn kaj observos ilin, la Eternulo, via Dio, konservos al vi

la interligon kaj la favorkorecon, pri kiuj Li ĵuris al viaj patroj; kaj Li amos vin kaj benos vin kaj multigos vin, kaj benos la frukton de via ventro kaj la frukton de via tero, vian grenon kaj vian moston kaj vian oleon, la frukton de viaj bovinoj kaj la frukton de viaj ŝafinoj, sur la tero, pri kiu Li ĵuris al viaj patroj, ke li donos ĝin al vi” (Readmono 7:11-13).

La skolastikuloj

La skolastika pensado estas ofte ri-

Merkantilismo estas movado en la ekonomia politiko dum la dua duono de la 17a kaj la unua duono de la 18a jarcento, kiu pledis por fortaj progresigo kaj protektado de nacia komerco kaj industrio. Oni strebis al plejble granda pluso en la komerca kaj pagbilancoj por akiri oron, kiun urĝe bezonis tiuj eŭropaj landoj kiuj ne havis proprajn orminojn (IKEV).

Ekonomiko estas scienco kiu havas la taskon priskribi, klarigi kaj aplikati la leĝojn aŭ laŭleĝecojn kiuj ekzistas en la interligoj inter la diversaj ekonomiaj fenomenoj. Ĉi-ri-late oni parolas pri priskriba, teoria kaj aplikata ekonomiko (IKEV).

Ekonomio estas la situacio de komunumo aŭ ŝtato el la vidpunkto de ĝia riĉeco kaj materia prosperado (IKEV).

gardata kiel kunfandiĝo de tri spiritaj tradicioj. La unua estas la filozofio de Aristotelo, la dua estas la biblio kaj la tria estas la romana juro. La 13a jarcento signifas la apogeon, kaj Tomaso la Akvinano (1225-1274) estas la plej konata reprezentanto.

La skolastikuloj estis teologoj kaj filozofoj, kaj de tiu pozicio ili faris ekonomiajn eldirojn. Ili havis opiniojn pri, i.a., la justa prezo, interezo kaj la natura leĝaro.

La justa prezo, kiu videtiĝis jam ĉe Aristotelo, estis tia prezo, kia spontanee regus sur la merkato, se trompo kaj devigo ne ekzistus kaj la cirkonstancoj ĉiel estus normalaj. En moderna ekonomika lingvo ni povas diri, ke prezo sur merkato de kompleta konkurenco estus justa laŭ la skolastikuloj. Kontraŭe, monopolprezo ne estus justa, kaj monopoloj estus kondamnitaj.

La opinio pri la justa prezo kondukas al la opinio pri la interezo. Same kiel Aristotelo kaj la biblioverkistoj, la skolastikuloj havis negativan sintenon al interezo, kun kelkaj esceptoj. Estas nature uzi monon kiel interŝanĝilon, sed nenature – kaj esprimo de avareco – provi igi monon kreske generi sin.

La natura juro aŭ natura leĝaro estas alia problemaro super kiu la skolastikuloj laboris. La natura juro estas sistemo de juraj normoj, kies fundamento estas en la ordo de la objektoj mem kaj en la naturo de la homo. Tial la natura juro ne dependas de la volo de iu oficiala leĝodonanto.

La ideo pri natura juro troviĝis jam ĉe Aristotelo. Ĝi estis plue ellaborata de la skolastikuloj, kaj poste en la 17a jarcento de filozofoj kiel Samuel von Pufendorf kaj Hugo Grotius. La ekonomikistoj de la klasika skolo transprenis ĝin. Adam Smith rigardis ekzemple komercon kaj liberan elekton de profesio kiel naturajn rajtojn. La natura leĝaro estas en la fono ankaŭ de multe da nuntempa ekonomika diskutado.

Pli da moralo ol analizo

Ni resumu la ekonomian pensadon de la antikva epoko ĝis la skolastikuloj. En tiu frua pensado, ni trovas pli da informoj pri moralo kaj justeco ol pri rilatoj inter ekonomiaj faktoroj. Plej ofte oni skribis pri komercado kaj aliaj formoj de interŝanĝo. La produktado ludis malgrandan rolon en ekonomiaj tekstoj antaŭ la industria revolucio, sed ni vidis ke la problemo pri produktado ne tute mankis, ekzemple en la pritrakto de Platono kaj Ksenofono pri labordivido kaj specialiĝo.

Bo SANDELIN

POLLANDO

Instruisto de la angla serĉata

En polaj lernejoj mankas instruistoj de fremdaj lingvoj. Parto de la nuntempe laboranta lektoraro ne havas adekvatajn kvalifikaĵojn, tial la ministrejo pri nacia edukado nun enkondukas la projekton „Jaro 0”, donontan la eblon plialtigi fakajn scipovojn.

La propono estas adresata ĉefe al instruistoj el vilaĝaj lernejoj. Tradicie jam plej forte estas serĉataj flanke de laborproponantaj direktoroj de lernejoj la instruistoj de la angla lingvo.

El 580 000 instruistoj laborantaj en la pola eduksistemo nur ĉirkaŭ 30 000 estas lektoroj de fremdaj lingvoj. El indikoj de la ministrejo pri edukado oni vidas, ke nune mankas 5000 ĝis 6000 instruistoj pri fremdaj lingvoj. Post senvalidigo de la deviga lernado de la rusa lingvo, en polaj lernejoj pliiĝas infanoj kaj gejunuloj lernantaj lingvojn de okcidenta Eŭropo. Komence de la jaro 1990 eksplicite pligrandiĝis la nombro de lernantoj de la angla kaj de la germana. En la lernojaro 1999/2000 la anglan lingvon en lernejoj lernis 40 % de la gelernantoj kaj la germanan 26,6 %: sufiĉe signifa elcento de la junularo, ĉar 18,1 % lernas la rusan lingvon. Malpli populara estas la franca. Ĝin lernas nur 4,2 %. La angla okupas la unuan lokon pri populareco en la urbaj elementaj lernejoj, ĝeneralklerigaj liceoj kaj fakaj mezlernejoj.

Malmulte da vilaĝa interesiĝo


Plej volonte la anglan lingvon lernas lernantoj de la silezia vojevodio (distrikto) kaj la germanan en lernejoj de la vojevodioj situantaj laŭlonge de la okcidenta limo de Pollando. Nur 19 % de la junularo el vilaĝaj teritorioj lernas okcident-eŭropajn lingvojn.

Ĝis la 1a de septembro de 1999 la deviga lernado de fremdaj lingvoj komenciĝis en la 5a jaro en la elementa lernejo. „Konvene al la reformado de la eduka sistemo enkondukata en lern-

ejojn, la deviga lernado de fremda lingvo komenciĝas en la 4a jaro de la elementa lernejo kaj estos daŭrigata en la gimnazio”, diris dum renkontiĝo en unu el la

varsoviaj gimnazioj Adalberto Książek [ksionjek], vicministro pri edukado.

En polaj lernejoj ĉiu lernanto devas elekti lernadon de du fremdaj lingvoj. Tamen, por la certigo de tiu eduka komforto mankas kvalifikitaj instruistoj. Preskaŭ duonon inter la nove dungitaj instruistoj de fremdaj lingvoj arigas diplomitoj de porinstruistaj kolegioj kaj de universitatoj. En la lernojaro 1999/2000 21,2 % de la instruistoj de la angla mal-



Lingvo-instruistoj: pli kaj pli serĉataj en Pollando.

havis la devigajn kvalifikaĵojn. Kaŭze de tio la ministrejo pri edukado proponas, precipe por instruistoj el kamparaj teritorioj, la projekton „Jaro 0”. Ĝi pretigados instruistojn dum unu jaro por ekzamenoj kaj por posta studado en lingvaj kolegioj. De septembro de la jaro 2000 tian studadon povos komenci pli ol 2000 instruistoj el vilaĝaj teritorioj, kiuj volas plialtigi siajn fakajn instruistajn konojn.

Stanisław ŚMIGIELSKI

HUNGARA

Lingvo agonianta

Nuntempe aŭtoroj ofte aludas la hungaran lingvon, kie temas pri supersignitaj literoj. Tial mi skizas la nunan staton.

Dekomence la hungaroj uzis runan skribon kaj post la ŝtatiĝo la latinajn literojn. Sed iom da literoj mankis en la aboco. Tial oni uzis la ipsilonon, kiel modifan helpliteron, kaj digramojn (sz, cs). La vokaloj laŭbezzone ricevis diversajn supersignojn. Post invento de la presado la lingvo ricevis la unuan difekton. La hungaraj presejoj ja havis ĉiujn supersignojn, sed la eksterlandaj ne. La morsa kodo uzis simbolojn diftongajn, sed oni malfacile deĉifras formojn kiel aa, ooe ktp.

La skribmaŝino estis vera plago. Ĝenerale oni aplikis nur la oftajn supersignitajn vokalojn (a, e). Sen tio la teksto estus nelegebla. La komputila erao kaŭzis veran danĝeron. Ekzistas komputiloj kun hungara klavaro, sed la uzado ne estas ofta. Eĉ en la plej elstara ĵurnalo oni ofte trovas vortojn erare dividitajn. La nova generacio nur koncentriĝas sur la komputilon, preterlasante la ortografion kaj la supersignojn. Sed ĝuste tio donus al la lingvo belsonon, ritmon, melodion. La senĉapelita teksto minacas la hungaran lingvon.

Karlo JUHÁSZ

BELGIO


Reen al la edena paradizo

Kiam laŭ la biblia rakonto Eva al Adamo proponis la unuan pomon, ŝi ne devis cerbumi: ĉu ne nocos la herbicidoj kaj insekticidoj. Plena je memfido ŝi povis transdoni sanan, puran frukton ... kvankam malpermesitan.

Intertempe la situacio tute ŝanĝiĝis. Pro la dioksina skandalo en majo 1999 la belga terkultura industrio forte suferis. Precipe la eksportado de agrikulturaj produktoj spertis gravajn damaĝojn. Krome, tiuj sekvoj trafis ne nur la rekte koncernatajn industriojn: produktantojn de ovoj, kokinoj, laktaĵoj, viando. Malgraŭ pluraj certigoj ke dioksino povas atin-

gi la nutraĵoĉenon nur tra uzita lardo, kaj ne tra plantaj produktoj – dioksino ne solviĝas en akvo – tamen estis suspektataj pro la eksterlanda malfido ankaŭ la belgaj legomoj kaj fruktoj.

Por eviti tiajn katastrofojn estonte, la organizaĵo de frukto-aŭkciejoj anoncis ke ene de periodo de tri jaroj, la belgaj fruktoproduktistoj devas transiri al sistemo de „medi-konsciaj” produktadometodoj. Ne temas pri absolute biologia produktometodo, tamen la intenco estas malpliigi la uzon de kemiaj rikoltprotektiloj. Tiun paŝon precipe instigis la demando – aŭ eble pli bone la postulo – de la grandaj vendejoj. Ili rimarkis ke daŭre kreskas la interesiĝo de la konsumantoj pri biologiaj produktoj. En la lasta jaro la vendoj kreskis je 50 elcentoj, kaj por la nuna jaro oni eĉ atendas duobliĝon. Krome, ili spertis ankaŭ gravajn perdojn, pro tio ke ili devis malplenigi siajn bretojn dum la dioksina krizo, kaj tion ili estonte nepre volas eviti.



Struto metas sian kapon en la teron por ne esti vidata. Ĉu same faras politikistoj en dioksinon?

Dubo pri efikeco

Etaj produktistoj tamen ne tro fidas je la efikeco de la sistemo. Ĉiam denove evidentiĝas ke, kvankam la problemoj okazas en grandaj entreprenoj bioindustriaj, la etaj produktistoj suferas pli pro tio ke la ĝeneralaj aranĝoj por kontraŭi la damaĝon estas tiom drastaj ke ili atingas eĉ etajn produktistojn, dum la problemon mem ili ne spertas. Tiel okazis kiam temis pri porka pesto, tiel estis dum la ovo-krizo. Produktisto en bazaro asertis ke en ŝia produktejo oni uzas nur grenojn por nutri la kokinojn, tamen ankaŭ ŝi devis fermi sian budon kaj forĵeti la tutan (laŭ ŝia aserto sanan) rikolton. Sama sorto trafis laktiston. Sed pro la malgrandeco de la entrepreno, ili apenaŭ ricevos asekurajn aŭ registarajn kompensojn.

Kaj samstile prikomentis la estontajn aranĝojn rilatajn al fruktoj la pomkulturisto: kiu kontrolos, kiamaniere kaj kiam? Tio estas preskaŭ nefarebla tasko, kiun oni faros nur laŭ dokumentoj ... Ĝi ja plimalfaciligos lian vivon pro la multaj administraj taskoj. Sed ĉu la kontroloj estos fidindaj?

Li ankaŭ esprimis dubon pri la sinteno de la konsumanto. Tiu multe pli aprecas la eksteran perfektecon de fruktoj: rondan formon, ruĝan koloron, saman grandecon ... ol ilian sanecon. Li povas scii. Fruktoj, kiuj kreskis je la sama

Nova krizo

Intertempe ekestis nova dioksino- kaj PCB-krizo en Belgio. Denove oni trovis PCB en brutar-nutraĵo. La ministrejo pri agrikulturo ĉi-foje tuj reagis. Tamen, du problemoj klare montriĝis: unue, ĝis nun ne estas klare kie troviĝas la fonto de la PCB-kontaminado. Due, denove estis ege malfacile eltrovi al kiuj bredistoj la produktanto liveris. Malgraŭ administraj reguloj: deviga registro pri aĉeto de krudmaterialoj kaj registro pri klientoj (ankoraŭ ne deviga), tiaj problemoj restas. La registaro nun volas ankoraŭ plirigorigi la regulojn, kaj fanfaronas ke Belgio estos la plej strikte kontrolata lando de Eŭropa Unio. gvd

arbo, ne same bone vendiĝas, kaj ne la prezo, sed la formo estas la decidiga elemento. Kaj fruktoj, kiuj ne estas kemie traktitaj kaj tial montras nigrajn makulojn pro la pluvo aŭ aliajn neperfektaĵojn, apenaŭ trovas aĉetantojn.

Reen al la naturo

Kvankam urĝe necesas ke la homo en la industriigita mondo retrovu la vojon al la naturo, oni povas dubi ĉu la rimedoj, kiujn uzas la agro-industrioj kaj frukto-aŭkciejoj, vere utilas. La konsumanto estas tiom for de la produktantoj kaj la vojo kondukas ĉiam pli for. La racia klarigo¹ estas la pligrandiĝo de la monda loĝantaro. Ĝi iĝas tiom granda, ke necesas amase pligrandigi la nutraĵo-produktadon. Tio eblas nur se oni aplikas bio-agrikulturon grandskalan kun ĉiuj ĝiaj diversaj teknikoj: kemiaj protektiloj kontraŭ fibestoj kaj malsanoj, sed ankaŭ genetika manipulado por aŭ pligrandigi la rikolton aŭ rezistigi plantojn kontraŭ malsanoj. Estas klare ke la reirvojo al la naturo ankoraŭ ne malkovriĝis.

Guido VAN DAMME

1. Tio ja estas racia klarigo, sed ĉu ankaŭ vera? Se oni vidas kiom da rikoltoj (pomoj, tomatoj, ktp) iĝas detruitaj, ĉar la produktisto ne povas ricevi sufiĉe bonan prezon, oni povas pridubi tion. Grenmerkato lastan jaron asertis ke Francio facile povas produkti grenojn por nutri dekoble sian propran loĝantaron. Se oni informiĝas pri la situacioj en evolulandoj, oni rimarkas ke ofte la nutraĵo-rikoltoj estas anstataŭigitaj per aliaj industriaj rikoltoj (ekzemple kotono). Per tia politiko la loĝantaro de tiuj landoj iĝas pli kaj pli dependa de nutraĵliverado el okcidento.



La kurŝa terlango estas 98 kilometrojn longa sabloamaso.

LITOVIO-RUSIO

Terlango – natura valoro

Antaŭ kelkaj jaroj la antikvan urboparton de la litova ĉefurbo Vilnius Unesko deklaris mondkultura heredaĵo. Povas okazi, ke en la listo de mondaj kulturaj kaj naturaj heredaĵoj aperos ankaŭ nacia parko de la kurŝa terlango, dividita inter Litovio kaj Rusio. La du ŝtatoj pasintjare kune deklaris sian deziron por enskribigi tiun naturan valoraĵon en la liston de la protektataj objektoj de Unesko.

La kurŝa terlango terhistorie formata el mar- kaj vent-drivigata sablo apartigas la Kurŝan Golfon disde Balta Maro. Ties norda sekcio (pli ol duono) apartenas al Litovio kaj la suda sekcio al la kalinigrada regiono de Rusio. La nordan sekcion kaj la kontinenton disigas la markolo de Klaipeda, sed sude la terlango ligiĝas per la semba terlango al la kontinento. La tuta kurŝa terlango estas 98 km longa, ĝia larĝo varias inter 380 m kaj 3,8 km. Sur la terlango akumuliĝis ĉirkaŭ 2 km³ da sablo, kiu formas dunojn.

Antaŭ la 13a jarcento sur la kurŝa terlango vivis prusoj, semboj, norde samogitoj, kurŝoj. En la 13a jarcento la terlangon okupis germanaj kruckavaliroj. Ĉirkaŭ la 16a jarcento translokiĝis ĉi tien fiŝkaptistoj kaj tiuj, kiuj volis eskapi militservadon kaj servuton. En la jaro 1541 ĉi tie loĝis 810 loĝantoj kaj meze de la 17a jar-

cento ilia nombro malkreskis ĝis 365. Dum la sepjara milito (1756-1763) grandan parton de la arbaroj oni forhakis kaj rezulte la ventoj blove amasigis kaj migrigis dunojn, kiuj sablokovris eĉ kelkajn vilaĝojn de fiŝkaptistoj. En la 19a jarcento oni komencis fiksi la dunojn, kaj sekve la nombro de la loĝantoj kreskis ĝis 2740 en la jaro 1885. La plej granda parto de la loĝantoj konsistis el litovoj, kiuj poste parte germaniĝis. Nuntempe sur la litovia parto de la Kurŝa terlango vivas ĉirkaŭ 3000 loĝantoj.

Sur la kurŝa terlango troviĝas pli ol cent kulturaj monumentoj. La litovan sekcion de la terlango ĉiujare vizitas ĉ. unu miliono da turistoj, la rusan ĉ. 100 000. La rusoj opinias, ke tiu kvanto jam estas limo por konservi la naturan karakteron de la terlango. Spertuloj de Unesko laŭdis litovojn pri akurata zorgado de la dunoj. Ili opinias, ĉi tie oni lasas pli da libera evoluo por la naturaj mirakloj kreataj de sablo, maro kaj vento. Tamen la plej altaj dunoj situas en Rusio kaj tie ili etendiĝas sur pli granda teritorio.

Ĉu la kurŝa terlango estos juĝita unu el la plej valoraj naturaj heredaĵoj de la mondo, iĝos deklarita fine de la jaro. Litovoj nur dubas, ĉu la troa evoluigo de tiu tereno ne estos la obstaklo, kiu malhelpos ilian strebon.

Laimius STRAZNICKAS

NATURKATASTROFOJ

Vulkanoj

Scienco konsideras la vulkanojn fascinaj esplorobjektoj, ne nur ĉar ili estas timigaj kaj mortokaŭzantaj erupciantoj de lafo, sed ankaŭ ĉar ili funkcias kiel natursondiloj en la terinterno.

Ĉi-momente en la mondo estas preskaŭ 600 aktivaj vulkanoj, kiuj havas erupciojn aŭ almenaŭ estis aktivaj en historia tempo. Vulkanoj troviĝas ofte tie, kie la kontinent-platoj dislokiĝas.

Vulkanismo estas ĉiu fenomeno, rezulte de kiu solidaj, likvaj aŭ gasaj substancoj atingas la tersupraĵon. La vulkanojn oni klasifikas plej ofte laŭ la kemia konsisto de la erupciaĵo. Tiu substanco en la terinterno estas nomata magmo, kaj post forlaso de la vulkanokratero ĝi povas esti lafo kaj vulkanaj sablo, polvo, tufo, lapilioj, bomboj, kaj aglomeraĵo. Ties ĉefelemento estas silika acido.

La baza magmo konsistas ĝis kvindek procentoj el silika acido kaj fandiĝas je 1000 Celsius-gradoj. Ĝi estas varmega inter 1000 kaj 1250 gradoj, tre maldensa kaj dum erupcio atingas relative rapide la tersupraĵon. La gasoj povas facile emani kaj en malgrandaj kvantoj. Pro tio fortaj eksplodoj ne okazas dum la erupcio de baza magmo, sed estiĝas rapide fluantaj lafofluo. Ni parolas pri efuzivaj vulkanoj. La estiĝantaj vulkanmontoj plej ofte havas la formon de plataj konusoj. La plej longa rigidiĝinta lafofluo, estiĝinta en 1783 post la eksplodo de la islanda vulkano Laki, etendiĝas 65 ĝis 70 km longe. Tiusence tipaj estas la vulkanoj sur Havajo aŭ Islando.

Se la magmo entenas pli, ekzemple



65 procentojn da silika acido, precipe se la temperaturo estas inter nur 700 kaj 1000 gradoj, ĝi estas malfacile fluanta. Pro tio la vulkanokratero inklinas al ŝtopiĝo; estiĝas premo, kiu fine kaŭzas pli aŭ malpli spektaklan eksplodon. Dume bomboj (ŝtonoj), sablo, polvo flugas tre alten en la aero, kaj multe da toksaj gasoj povas deflui laŭ la flanko de la vulkano.

Tiaj acidaj magmoj kaj sekve eksplodemaj vulkanoj tipe estiĝas tie, kie la substanco de la terkrusto estas premata de kontinent-delokiĝoj en la profundo kaj tie fandiĝas. La eksplodforto de la vulkanoj estas grave pligrandigata, se akvo kaj magmo intertuŝiĝas. Akvo bolinte grave ekspansias. El unu litro da akvo estiĝas 1244 litroj da vaporo. Vulkanoj el la eksplodema tipo troviĝas laŭlonge de zono ĉirkaŭ Pacifiko. Pro la multnombraj vulkanoj oni nomas tiun zonon „Ringo de l' fajro”.

Kiel la plej forta vulkana erupcio en la mondo estas konsiderata tiu okazinta sur la mediteranea insulo Santorin ĉir-



kaŭ la jaro 1600 a.K.. Sciencistoj komunikas, ke dume 30 km² da magmo erupciis, parte kiel „cindraj” nuboj (sablo, polvo), parte kiel lafofluo. Pro la eksplodo granda parto de la insulo malaperis en la akvo, kaj estis detruita ankaŭ la altevoluinta kulturo de minoanoj loĝantaj sur la insulo.

Pli ol 10 000 homoj – multaj fontoj atestas eĉ pri ĝis 100 000 – forpasis, kiam inter la 10a kaj 11a de aŭgusto 1815 eksplodis la monto Tambora sur Sumbava (Indonezio). Erupciaĵo de 150 km³ estis disŝutita sur teritorio de 500 000 km². La polvo atingis alton de 70 km kaj kaŭzis „someron sensunan” en partoj de Eŭropo kaj Nord-Ameriko.

Similajn krepuskajn fenomenojn sur la tuta tero estigis la erupcio de la vulkano Krakatoa en Indonezio la 27an de aŭgusto 1883. La eksplodegon oni povis percepti eĉ en distanco de 4000 km, en Aŭstralio. La estigita tertremo estis mezurebla sur la tuta terglobo. La pumikoj ĵetitaj en alton de pli ol 50 km falis en la sekvaj dek tagoj ene de radiuso de pli ol 5000 km. Tsunami (mara ondego), kiun kaŭzis la submara tertremo pro la eksplodo de la kratero, ĉe la bordoj altiĝis ĝis tridek metroj kaj forlavis kaj mortigis 36 000 personojn.

Evgeni GEORGIEV

Ĉu antimaterio en la universo?

Estas konata delonge la ekzisto de la tiel nomata antimaterio, konsistanta el antipartikloj kiuj havas kontraŭan ŝargon aŭ spinon ol la partikloj de la ordinara materio.

La unua antipartiklo, kiun observis en 1932 la amerika fizikisto Carl D. Anderson inter la trakoj de kosma radiado en nubkameron, estis la pozitrono, kiu havas la saman mason, sed pozitivan ŝargon, kompare kun la delonge konata negativŝarga elektrono. Inter la multaj antipartikloj eĉ neŭtraj partikloj (neŭtronoj, neŭtrinoj) estas distingeblaj pro sia kontraŭa spino (horloĝdirekta aŭ kontraŭa), dum ili veturas en la spaco. La nombro de la konataj elementaj partikloj kaj antipartikloj estas jam tiel granda, ke oni ŝerce parolas pri partikla kaj antipartikla zooj.

Estas tamen strange, ke oni trovis nur individuajn antipartiklojn, sed ne antimaterion. Do kreiĝis la hipotezo, ke dum la praeksplozo la maso de la antimaterio estis pli malgranda ol tiu de la ordinara materio. Kaj ĉar ĉe interpuŝiĝo partiklo kaj antipartiklo neniigas unu la alian, do ambaŭ malaperas kaj fariĝas energio disradiata. Do post tempo la antimaterio malaperis el la universo.

Estis sensacio, kiam, post prilukto de grandegaj malfacilaĵoj, en la Eŭropa Centro de Nuklea Esploro CERN, Ĝenevo, en 1995 oni sukcesis kunmeti kompletan antiatomon, ne nur memstarajn elementajn partiklojn. La malfacilaĵoj solidigis la opinion, ke en la universo jam tute ne ekzistas antimaterio.

Tamen iuj hipotezas, ke ĉe la rando de la Kosmo eble ekzistas izolitaj antimaterio-„poŝoj”. En humura poemo, titolita *Danĝeroj de moderna vivado*, Harold P. Furth skribas pri malproksima insulo el antimaterio, kie vivis d-ro Edvardo Anti-Teller kun anti-amikoj kaj anti-parencoj, sen ia ajn suspekto pri alia mondo. Iun matenon venis vizitanto de la Tero. Ĝoje ili kriis unu al la alia tra super la plaĝo; ja ili estis similaj kiel du lentoj. Ili premis la manojn unu al la alia, kaj la restaĵo estis ... gama-radioj. OH



Deĉifrado de la paskinsula skribo


En la artikolo „Unu mistero solvita”, aperinta en MONATO 1997/5, Bradley Kendal raportis pri deĉifrado de skribo, sola indiĝena en

Ociano, ĉizita sur lignaj tabuletoj trovitaj sur Paskinsulo (Rapa Nui). El tiuj nur 21 transvivis la konvertan agadon de la kristanaj misiistoj; multajn skribtabulojn (antaŭe konsideritajn „tapu”, t.e. sanktaĵo, tabuo) la indiĝenoj mem detruis.

La lingvon de la paskinsulanoj la misiistoj de la ordeno Sacré Cœur lernis, sed pri la ĉizitaj signoj (glifoj), okupiĝis epigrafikistoj (Thomas Barthel) kaj etnologoj (Alfred Métau).

En 1873 episkopo Tepano Jausen instigis paskinsulanon Metoro, elmigrantan al Tahiti, legi la glifojn. En 1886 okazis la samo kun la multjarulo Are Vaeiko, sed la eldiro de izolitaj glifoj ne donis koheran sencon. Ankaŭ Steven Roger Fischer el Auckland (Nov-Zelando), spertulo pri 25 lingvoj, klopodis deĉifri la glifojn. Li publikigis en la verko *Rongorongo* la bildon de 12 000 glifoj, sed la deĉifrado lamis pro grandega semantika pelmelo.

Lastatempe la 61-jara bremena lingvisto, Egbert Richter, religio-scienisto kaj tradukisto de antikvaj hindiaj skriboj, prezentis en la hamburga universitato 214-paĝan doktoran disertaĵon titolitan *La*



skribtabuloj de Paskinsulo – kontribuo al ilia deĉifrado. Kvar komplete tradukitaj tabulotekstoj malkovras bizarajn detalojn

pri moroj kaj seksritoj de la iniciado, kiu okazis sur certa roko ĉe la kultvilaĝo Orongo, sidejo de la Timo (birdoviro). Arkeologoj elfosis tiuj domojn, kaj la rokoj mem estas prisemitaj de petroglifoj kun seksaj signifoj.

La dancaj ceremonioj okazis sub influo de ebriigaj trinkaĵoj faritaj el *Piper methysticum*, kiu enhavas la konatajn kavainon kaj metisticino; tiu trinkaĵo similas verŝajne al Kawa, vaste konata en Ociano. En la centro de la aranĝo staris la seksmaturaj geknaboj. La ritestro estiĝis la „birdoviro” (Timo), verŝajne la anstataŭanto de la fekundeco-dio Make-make.

La pli fruaj eksplikoj, ekzemple de Metoro, montriĝis kamuflaĵoj, faritaj pro la turmentita konscienco de la novkristaniĝinto. La lingvaj vualaĵoj enhavas tamen la gvidmotivajn simbolojn de la ritoj, kiuj priskribas defloradon kaj kopulacion, al kiu la t.n. „birdoinfanoj” (pokimano) devis sin submeti. Tiaj ceremonioj fakte okazis eĉ publike sur la Samoa-arkipelago.

Rudiger HAUGER

Fonto: M. SCHULZ, Der Spiegel 44/1999.

FINNLANDO


Kolekti sonorilojn

Se vi aŭtus en Finnlando laŭ la ŝoseo E75 tre norden, vi atingus benzinstacion nomatan VASKIKELLO (bronza sonorilo). Ties posedantoj kolektas sonorilojn.

Sendube estus pli facile kolekti poŝtmarkojn aŭ iujn aliajn etaĵojn ol verajn sonorilegojn preĝejajn, kiuj povas pezi eĉ plurajn tunojn. Ne malpli probleme estas ankaŭ kolektadi, ekzemple, rompiĝemajn vitrosonoriletojn.

La grandaj sonoriloj pendas subtegmente aŭ troviĝas subĉiele. Iuj estas farbitaj rozkoloro, aliaj estas brile orumitaj. Krome estas ankaŭ sonoriloj, kiuj havas la kolorojn de bronzo kaj kupro, kun verdaj nuancoj.

La kolektado komenciĝis de unu malgranda bronza sonorileto, kiu antaŭe estis uzata en finnaj bienoj por voki la kamplaboristojn al manĝoj. Tiu-speca sonorileto kutime pendis en tureto sur la tegmento de iu stokejo. La sonorilo de ĉiu bieno havis malsaman sonon, kaj eĉ la ĉevaloj rekonis ĝin en sia bieno! Kiam poŝhorloĝoj vi-



Reklamsonorilo de la restoracio de VASKIKELLO.


raj aperis, iu el la kamplaboristaro ĉiam sciis la horon, kaj la manĝosonoriletoj estis forgesitaj. Poste ili tamen ekfuroris kiel kolektindaj antikvaĵoj kaj ofte okazis, ke iu ŝtelis la sonorileton de stokejturo.

Pluraj preĝejoj vendis siajn malnovajn sonorilojn al VASKIKELLO, kondiĉe ke ili restu respektataj kaj videblaj por la publiko. Antaŭe la sonoriloj vokis homojn al diservoj, nuptoj, enterigoj, kaj oni sonigis ilin je la 18a horo ĉiusabate por proklami komencon de la semajnfina ripozo. Nun la vizitantoj de la menciita sonoril-kolekto rajtas sonigi ilin nur per fingro, ĉar la sonoj povus surdigi aŭ almenaŭ suferigi kaj timigi la amatorajn sonigantojn. Unu el la pli malgrandaj sonoriloj estas pendigita tute malalte, kaj per ĝi homoj estas atentigitaj pri la manko de lernolibroj en la tanzaniaj lernejoj. Kiam oni aŭdas ĝiajn sonojn, oni rigardas al ĝi kaj al la apuda tabulo kun priskribo de la deveno kaj monpeto por la tanzaniaj lernejoj.

Serio da orumitaj sonoriletoj en malferma verda tureto muzikas 10 diversajn melodiojn, unu post la alia, se iu telefonas al ekfunkciiga numero. Ne malproksime staras publika telefono sub grandega ruĝa ŝtarkloŝo, kiu ŝirmas la telefonantojn de pluvo, neĝo kaj sunbrilo. La kloŝo venis el Bremen, Germanio, kie ĝi servis dum la jaroj 1922-1990 en la tiea Stefan-preĝejo.

Multaj el la malnovaj sonorilegoj surhavas tekstojn en la germana, latina aŭ rusa lingvoj. Siatempe ili sonis je la gloro de Dio, „preĝis” por paco kaj pardonemo. Aliaj sonas je la eterna memoro de ies bonaj gepatroj aŭ memorigas nin pri niaj pekoj kaj devoj, pri la efemereco de ĉio ĉirkaŭ ni. Unu sonorilego estas dediĉita al iu Papo, alia al la venkintoj de iu milito. Dum jarcentoj oni fandis el sonoriloj kanonojn kaj refandis la kanonojn en sonorilojn.

En la kolekto de VASKIKELLO trovblas ankaŭ ŝipsonoriloj. Antaŭe ili



Fando de sonoriletoj.

PAAVO RÖNKKÖ




SALIKO

1




PAAVO RÖNKÖ

2



3

PAAVO RÖNKÖ



4

SALIKO

1. Sonril-kloŝo de publika telefono.
2. Manĝosonorileto.
3. Ŝipsonorilo.
4. Grandaj sonoriloj.
5. Vitrosonoriletoj.
6. Hontotintileto.
7. Budhisma sonorilo el Japanio.




5

SALIKO



6

PAAVO RÖNKÖ



7

PAAVO RÖNKÖ

anoncis, kiom el la ankroĉeno oni eligis, kaj dum nebuloj ili avertis aliajn ŝipojn pri ebla kolizio. Iom flanke staras verdiĝinta templosonorilego budhisma, fandita en 1990 de japana sonorilmajstro, kies prapatroj lernis la metion antaŭ dek generacioj. La elstarajoj sur la surfaco de la budhisma sonorilo simbolas cicojn kaj teneran virinan koron. Ilia nombro estas sankta: 108.

En la florbedoj de VASKIKELLO kreskas kvindeko da diversaj specioj

de kampanuloj kaj aliaj kloŝformaj floroj. La unua sonorileto de la kolekto surhavis la tekston „Gardu la naturon bela!” en finna lingvo.

Tra la fenestroj de restoracio benzinstacia admireblas delikataj, multkoloraj aŭ senkoloraj vitrosonoriletoj, kaj sur la muroj oni povas vidi malnovajn metalajn tintilojn, iam uzitajn sur jungilaroj. Eblas vidi ankaŭ muron, kiun plibeligas porcelanaj 26-sonorila kariljono kaj vinberaroj. Tie troveblas ankaŭ modelo de mezepoka

hontotintileto, kiun pigrulo devis kunporti pendigita antaŭ la frunto.

La sonoril-kolektantoj lernis fandi tintiletojn kaj sonorilojn laŭmende. Ili uzas miksaĵon de kupro (78 %) kaj stano (22 %). La kolektantoj ŝercdiras, ke la aldonado al ĝi de iom pli da arĝento rimarkeble plibeligas la tintadon. La kolektado de sonoriloj tute entuziasmigis ne nur ilin, sed ankaŭ la vizitantojn. Ili rajtas senpage ekkoni la kolekton, se ili haltas ĉe la benzinstacio VASKIKELLO.

Saliko

de Julian Modest

Vetiha

Vesperigis. Venis la kvietaj horo, en kiu la naturo, laca de la taga varmo, preparis sin ekdormi en la friska ĉirkaŭbrako de la somera nokto. Mi kaj Karlo sidis en eta kafejo en vilaĝo Kiten kaj trinkis malvarman bieron. Dum tiu somero, kiam ni ripozis ĉe la maro, ni ŝatis antaŭvespere trinki bieron en iu silenta kafejo, kie ne estis multaj homoj kaj ni povis trankvile babilo. Ni ambaŭ ŝatis la malvarman bieron kaj la dolĉan babiladon dum la pigraj someraj antaŭvesperoj. Preter la kafejo pasis multaj homoj. Alflugis diverslingvaj vortoj, sed ni babilis kaj preskaŭ neniun ni rimarkis. La kaftabloj estis ekstere, sub la ombro de olda vitlaŭbo. De la maro blovis leĝera sala vento kaj agrable estis sidi kaj trinki la malvarman bieron.

Karlo lante levis sian plenan glason. en la helbluaj okuloj ekbrilis rideto. Mi konjektis, ke li rakontos ion interesan, kion eble al neniuj ĝis nun li konfesis. Li trinkis el la glaso, reveme rigardis al la maro kaj mallaŭte ekparolis:

Tio okazis dum la terura jaro, kiam la bulgara registaro decidis ŝanĝi la nomojn de la turkoj, kiuj loĝas en Bulgario. Mi ne sciis kies estis tiu ĉi ideo, sed dum mallonga tempo ĉiuj turkoj devis havi bulgarajn nomojn. Tiam mi loĝis en malgranda urbo en la norda Bulgario, kie multaj loĝantoj estis turkoj. Mi laboris kiel pentristo en fabriko por modaj vestoj. Kiam oni komencis ŝanĝi la nomojn de la turkoj, la eta kaj trankvila urbo eksimilis al abelujo, plena de ekscititaj kaj koleraj abeloj. La turkoj komencis protesti kaj kontraŭstari al la perforta ŝanĝo de la nomoj. La urba administrantaro entreprenis reprezaliojn. Komenciĝis strataj bataloj kaj venĝoj. La bulgarioj kaj turkoj, kiuj dum la jaroj loĝis en amikeco kaj paco, nun ekstaris unuj kontraŭ la aliaj, kaj jam nenio povis pacigi ilin. En la urbeto iĝis terure kaj malsekure. Disvastiĝis famoj, ke la turkoj komencis sin venĝi al la bulgarioj. Oni parolis, ke vespere la turkoj embuskis kontraŭ la bulgarioj kaj ĵetis ilin en la riveron. La bulgarioj ne permesis al la turkoj trapasi la ĉefan placon de la urbeto. La malamo kreskis kaj densiĝis kiel hajlonubo kaj neniuj povis eviti ĝin.

En la fabriko turkoj kaj bulgarioj daŭre laboris kune, sed jam ne kon-

versaciis unuj kun aliaj. Tie la kudristinoj estis turkaj, kvietaj labor-emaj virinoj, sed post la eksplodo de la eventoj, ili ŝanĝiĝis. En iliaj klin-itaj malsupren rigardoj mi vidis malamon kaj ofendon. Antaŭe ili malmulte parolis sed nun eĉ vorton ne diris. En iliaj rigardoj kaj gestoj estis frido. Nun, kiam ili konversaciis unu kun alia, ili parolis nur turke, kvankam ili bone sciis, ke en la fabriko oni severe malpermesis paroli la turkan. Kiam mi pasis preter tiuj ĉi virinoj, kiuj klinis kapojn al la kudromaŝinoj, mi sentis min kulpa. Antaŭ tagoj ili rilatis al mi gaje kaj amike, sed nun ili rigardis min malame, malestime, kvazaŭ mi kulpus pri la decido de la registaro. Neniu el ili eĉ vorton diris al mi, kaj en iliaj okuloj mi vidis profundan kaj amaran doloron. Ili estis humiligitaj, primokitaj. Dum kelkaj semajnoj ili devis ŝanĝi siajn nomojn, kiujn ili ricevis en la tagoj de siaj naskoj. Dudek, tridek aŭ kvindek jarojn ili nomiĝas Fariba, Fatemeh aŭ Svediyeh kaj nun ili devis nomiĝi Maria, Anna aŭ Viktoria. Por ili, por ilia kredo tio estis nekomprenebla, netolerebla, ofenda. Tiuj, kiuj rezignis ŝanĝi siajn nomojn, devis tuj forlasi Bulgarijon, forveturi al Turkio kaj lasi ĉi tie siajn domojn, posedaĵojn, parencojn, konatojn. Ilia tragedio estis granda, sed per nenio mi povis helpi al ili. Silente mi observis ilin. Mi vidis iliajn turmentojn, sed mi ne kuraĝis eĉ unu bonan aŭ amikan vorton diri al ili, malgraŭ ke mi sciis, ke en tiu ĉi momento mi devis trovi forton kaj kuraĝon diri al ili nur unu varman vorton aŭ amike ekrideti kiel ĉiun matenon antaŭe, kiam, veninte en la fabrikon, mi ridete renkontis ilin.

Sed iun matenon okazis io, kio igis min ekstrema. Mi eniris la ejon, kie laboris ĉirkaŭ dudek virinoj. Regis silento. Nur la kudromaŝinoj monotone krakis. Mi pasis preter la kudromaŝinoj kaj mi rigardis la robojn, kiujn la kudristinoj kudris nun. Neniu el la virinoj levis kapon por alrigardi min. Mi estis kvazaŭ nevidebla. Tamen, kiam mi atingis la lastan kudromaŝinon en la vico, mi rimarkis, ke la junulino, kiu kudris per ĝi iomete levis sian kapon kaj ekridetis al mi. Mi ne kredis, mi opiniis, ke nur tiel ŝajnas al mi, sed mi ne kuraĝis alrigardi ŝin. Mi sentis, ke la aliaj kudristinoj atente sekvas ĉiun

mian paŝon kaj ĉiun mian movon, malgraŭ ke ŝajne ili ne rigardas min. Mi daŭre paŝis malrapide kaj mi meditis maltrankvile: ĉu tiu ĉi junulino vere ekridetis al mi? Mi bone konis ŝin. Ŝi nomiĝis Vetiha kaj en bulgara ŝia nomo signifas „kun multe da amo”. Vetiha eble estis dudekjara kaj nur antaŭ tri monatoj ŝi komencis labori en la fabriko. Ŝi estis gaja junulino kun kaŝtankoloraj haroj, malhelaj okuloj, similaj al du profundaj putoj. Io enigma kaj alloga estis en ŝia rideto kaj en ŝia mola varma rigardo. Antaŭe mi kutimis iom ŝerce babilo kun ŝi, sed jam de monatoj mi ne kuraĝis eĉ alrigardi ŝin.

Dum la tuta tago nevole mi meditis pri ŝia subita enigma rideto kaj daŭre mi demandis min, ĉu ĝi estis hazarda. La sekvan tagon ĉio estis pli klara kaj nedubinda. Vetiha vere ekridetis al mi. Ŝi sola, inter ĉiuj inoj, kiuj laboris en la vasta ejo, kvazaŭ dezirus diri al mi, ke mi ne kulpas pri tio, kio okazis, kaj ni devas resti geamikoj kaj gekolegoj. Preskaŭ la samon mi dezirus diri al Vetiha, sed mi sciis, ke se mi alparolus ŝin, la aliaj virinoj forpelos ŝin el sia komunumo. Neniam ili pardonos ŝin, ke ŝi parolis kun bulgario. Mi bone sciis, ke inter mi kaj Vetiha jam estis alta muro, kaj ne eblis ĝin neniigi.

La tagoj pasis, tamen la psikozo en la urbo ne ĉesis. Sur la stratoj videblis armitaj soldatoj kaj policanoj. Oni diris, ke la turkoj pafmortigis policanon. Tial en la urbon venis policanoj de aliaj urboj por zorgi pri la ordo kaj trankvilo ĉi tie. La pafmortigo de la policano estis nur famo, kiu celis vekti en la bulgarioj malamon kontraŭ la turkoj.

La bulgarioj jam kutimis aĉeti de apartaj vendejoj, viziti apartajn kafejojn. La turkoj aĉetis de aliaj vendejoj kaj vizitis aliajn kafejojn en alia parto de la urbo. Oni ne permesis al la turkoj kolektiĝi kaj renkontiĝi sur la stratoj aŭ en la kafejoj.

De mateno ĝis vespero sur la stratoj videblis kamionoj kaj aŭtoj kun pakajoj, kun olduloj kaj infanoj, kiuj ekveturis al la suda limo de la lando. La turkaj familioj vendis malkare siajn domojn kaj forkuris. Multaj el ili ne prenis eĉ la plej necesajn aĵojn kaj lasis ĉi tie sian meblaron kaj ĉion, kion ili havis. La urbeto, kiu antaŭ monato estis trankvila kaj gaja, nun

similis al dezerta urbo, tra kiu pasis pesto. De ĉie gvatis timo kaj prema senespero. La stratoj estis senhomaj, turpaj, la kafejoj malplenaj kaj neniu kuraĝis eniri en ilin, kvazaŭ tie eksplodis bombo.

En iu varma julia posttagmezo mi iris en la poŝtejon sendi leteron. Kiam mi eliris, iu rapide proksimiĝis al mi kaj eta ina mano ŝovis noteton en mian poŝon de la jako. Granda nigra tuko volvis la kapon de la virino. Videblis nur ŝiaj okuloj kaj laŭ la rapida irmaniero mi tuj devenis, ke ŝi estas Vetihia. Mi daŭrigis la vojon al mia domo sen elpreni la noteton, ĉar eblis, ke iu estis vidinta nin.

Nur kiam mi eniris la ĉambron, mi elprenis la noteton kaj tralegis ĝin: „Ĉi-vespere je la oka horo mi venos en vian domon. Atendu min.”

Mi ekstremis. Neniam mi supozis, ke Vetihia kuraĝas tiel malprudente agi. Eĉ mi tute ne povis klarigi al mi kio igis ŝin fari tion. Ĉu ŝi kaŝe amis min? Vere mi estis juna, fraŭlo, sed mi havis fianĉinon, kiu loĝis kaj studis en la ĉefurbo kaj ĉiun sabaton kaj dimanĉon mi veturis al Sofio por esti kun ŝi.

La noteto de Vetihia ĝojigis kaj maltrankviligis min. Mi tre bone sciis kio okazos, se iu el la parencoj de Vetihia ekscius, ke ŝi kaŝe gastis al mi. Ŝia patro kaj fratoj certe tuj mortigos ŝin. Iliaj moralo kaj familiaj leĝoj permesis tion. Eĉ ili min mortigos. La venĝo trafos min sendepende de tio kie mi troviĝas. Mi ne povis esperi indulgon. Mi miris. Kia estis la kialo pro la frenezigo de Vetihia? Ĉu nekonsentita amo?

Mi fermis min en la domo kaj maltrankvile atendis la proksimiĝon de la oka horo. Mi loĝis sola en eta domo, proksime al la gimnazio. Mi sidis en la ĉambro, kvazaŭ sur dornoj kaj ofte oftege gvatis tra la fenestro de kie videblis la korto, la korta pordo kaj la strato. Mi eĉ ne kuraĝis ŝalti la radioricevilon. En la tuta domo regis tombeja silento, kvazaŭ ĉiuj mebloj senmove atendis ion teruran. La minutoj ege malrapide pasis kaj la horloĝmontriloj apenaŭ proksimiĝis al la oka.

Ĝuste je la oka, kiam jam komencis iom krepuskiĝi, malhela ombro rapide enŝteliĝis tra la korta pordo. La pordo apenaŭ ekgrincis, la ombro kure trapasis la korton kaj post sekundoj mi aŭdis, ke la pordo de la domo, kiu ne estis ŝlosita, malfermiĝis.

Vetihia ekstaris antaŭ mi en la ĉambro. De la kapo ĝis la piedoj ŝi estis en nigraj vestoj. Nigra tuko volvis ŝian kapon kaj nur ŝiaj malhelaj okuloj videblis. Ŝi surhavis nigran sakpantalanon kaj neniu povis supozi, ke sub tiuj ĉi vestoj kaŝas sin junulino. Mi silentis kaj ne sciis kion fari. Per abrupta movo Vetihia forprenis la

kaptukon kaj ĵetis ĝin sur la plankon. Kvazaŭ ŝi liberiĝus de io nenecesa, peza, kio ŝin sufokis. Ŝiaj grandaj humidaj okuloj fiksrigardis min kaj nesenteblo mi dronis en ilia profundeco. Obtuze mi sukcesis ekflustri:

- „Vetihia...”

Ŝi proksimiĝis al mi kaj diris:

- „Delonge mi devis veni. Miaj patro, frato kaj patrino rezignis ŝanĝi siajn nomojn... Post semajno ni forveturos al Turkio. Pentru min por rememoro.”

En ŝiaj vortoj estis peto, amaro kaj doloro.

- „Kiam?” - mi demandis.

- „Nun.”

- „Tamen.”

- „Nun!” - ŝi ripetis firme.

Ŝia rigardo sparke brilis kaj mi ne povis kontraŭstari.

- „Bone” - mi konsentis. - „Sidiĝu ĉi tie, ĉe la tablo.”

Mi preparis la stativon, la paperon, la krajonojn kaj ekstaris antaŭ ŝi. Atente mi ekrigardis ŝian blankan kiel lakton vizaĝon. Ŝajnis al mi, ke nun unuan fojon mi vidas ŝin. Mi ne supozis, ke ŝi tiel belas. Ŝiaj vizaĝtraĵoj estis molaj kaj teneraj. Ŝiaj lipoj similis al framboj, maturaj, sukoplenaj. Se mi kirus ilin, ili tuj kreviĝus kaj sorĉa nektaro fluus el ili. Ŝiaj brovoj estis maldikaj, iom kurbigitaj. ili preskaŭ tanĝis unu la alian kaj similis al fajnaj filigranoj. Ŝia nazo estis eta kaj rekta. Talenta skulptisto kvazaŭ ĉizus ĝin. Tamen la plej allogaj estis ŝiaj okuloj, grandaj, malhelaj. Mi ne povis ŝiri mian rigardon de ili. Nun el ili radiis decidemo, kuraĝo, tenero, varmo kaj amo. Tiuj ĉi okuloj, kiuj eble longe kaj kaŝe observis min, nun havis kuraĝon alrigardi min rekte kaj klare. Tiuj ĉi okuloj aspiris min, deziris min. La krajono en miaj fingroj ekstremis.

Mi rigardis ŝin, penetris en ĉiun ŝian vizaĝtraĵon kaj arde deziris pentri la plej belan portreton en mia vivo. Mi deziris montri al Vetihia, ke mi estas vera pentristo, ke ŝia beleco ekvivos sur la papero kaj kiu vidos ŝian portreton restos ravita kiel mi nun, kiu staras antaŭ ŝi. Vetihia mirigis min per sia kuraĝo kaj decidemo. Mi neniam supozis, ke en tiu ĉi fragila tenera junulino estas tiom da forto kaj volo. Verŝajne mi mem neniam estos tiel kuraĝa kiel ŝi. En mia portreto mi deziris montri ŝian firmecon. Ja, Vetihia estis preta venki ĉiujn obstaklojn por realigi sian celon. En la portreto mi emfazis la kuraĝon de la fragila Vetihia. Mi pentris la faldetojn ĉe ŝiaj lipoj, kiuj montris ŝian obstinan karakteron. Mi pentris la fajrerojn en ŝiaj esprimplenaj okuloj.

Mi aspiris Vetihan per mia konscio kaj korpo. Mi sentis, ke post ŝia forveturo, mi ne povus plu vivi. Mi pentris kaj pli kaj pli profundiĝis en la pentrado. De tempo al tempo Vetihia

alrigardis min esploreme. Ŝi sidis trankvile kaj aspektis iom revema. Eble ŝi meditis pri la estonteco, kiu ŝin atendis. Aŭ eble ŝi rememoris nian urbeton, kie ŝi naskiĝis kaj loĝis. Ĉi tie restos ŝiaj amikinoj kaj konatinoj. Ŝi adiaŭos siajn travivaĵojn kaj rememorojn.

Unu ludema buklo de ŝia kaŝtankolora hararo falis sur ŝian glatan frunton kaj ĵetis sur ĝin etan ombbron. Nun mi pentris tiun ĉi buklon kaj la apenaŭ videblan ombbron sur la frunto. La tempo pasis. Mi maltrankviliĝis, sed Vetihia aspektis kontenta kaj feliĉa. Malofte la feliĉo povus tiel lumigi la okulojn - meditis mi. Ankorau iomete kaj la portreto estos preta. Mi faris la lastajn korektojn. Mi sentis min laca, kvazaŭ mi plenumus malfacilan pezan laboron.

- „Jen ĝi estas preta” - flustris mi.

Vetihia stariĝis malrapide de la seĝo, proksimiĝis al mi kaj alrigardis la portreton.

- „Mirinde” - diris ŝi.

Poste subite ŝi brakumis kaj kirus min. Ŝiaj lipoj bruligis min.

- „Mi amas vin, ĉiam mi amis vin...” - flustris ŝi.

El ŝiaj okuloj ruliĝis larmoj kiel pezaj pluvaj gutoj.

- „Vetihia, ankaŭ mi amas vin, sed vi komprenas... ne eblas...”

- „Jes” - ŝi alrigardas min.

La ĝojo, kiu brilis en ŝiaj okuloj, dum mi pentris ŝin, nun malheliĝis. Ŝi bone komprenis: La amo inter ni ne estas ebla. Por ŝi alia vojo ne ekzistas. La sola vojo gvidis al Turkio. Vetihia denove brakumis min kaj singultis. Ŝia kapo kuŝis sur mia ŝultro. Nenion mi povis diri al ŝi kaj mi nur ripetis:

- „Vetihia, Vetihia...”

Ŝi malrapide levis la kapon, viŝis la larmojn kaj gestis al la portreto.

- „Ne” - diris mi. - „Se vi prenos kaj portos ĝin hejme, via patro mortigos vin. Ĉu vi scias kio signifas tion? Via kredo ne permesas al fremda viro vidi viajn okulojn, kio okazos kiam via patro ekscios, ke iu pentris vin. La portreto restos ĉi tie. Ĝi kaj mi atendos vin reveni.”

Vetihia denove ekploris, sed mi estis firma. Ŝi volvis sian kapon per la longa nigra tuko kaj paŝis al la pordo.

- „Adiaŭ” - diris ŝi. Ĝi estis ŝia lasta vorto.

Vetihia eliris kiel ombro kaj fandiĝis en la mallumon, kvazaŭ neniam ŝi estus ĉi tie.

Karlo eksilentis. Jam tute vesperiĝis. En la kafejo, kie ni sidis, restis malmultaj homoj. La zumo de la strato delonge silentiĝis. De la maro alflugis friska, tikla vento, kiu odoris je salo, fiŝoj kaj algoj.

La jaroj pasis, sed plu nenion mi eksciis pri Vetihia. Nur la portreto restis por memorigi al mi, ke tio, okazis ne estas sonĝo. ■

Aktoro malliberigita

Kiam en 1979 mi ekvidis en Libro-servo de Universala Kongreso diskon kun deklamaĵoj de Nikolaj Rytjkov, mi havis fortan tenton aĉeti ĝin. Sed unue, mi ne havis sufiĉe da mono; due, se sovetiaj doganistoj trovis la diskon, mi perdus por ĉiam eblon vojaĝi eksterlanden, por ne paroli pri alispecaj malagrablaĵoj.

Se vi konas la libron de Ulrich Lins „La danĝera lingvo”, sciu, ke impulson verki la parton pri persekutoj de Esperanto en Sovetio donis al la aŭtoro renkontiĝo kun Nikolaj Rytjkov. Magnetofona registraĵo de intervjuo kun la aktoro estas la ĉefa enhavo de la prezentata libro, kiun ame kompilis Maria Abolskaja el Peterburgo. La ceteron konsistigas rememoroj (inter ili, de Marjorie Boulton kaj Eli Urbanova), komentoj kaj unikaj fotoj.

Nikolaj Rytjkov, profesia aktoro de teatro kaj aktiva esperantisto, estis arestita en marto 1938. Post torturado dum esplordemandadoj, li, same kiel aliaj esperantistoj, estis akuzita, ke li estas aktiva membro de la internacia spiona organizaĵo, kiu kaŝas sin sur la teritorio de USSR sub la nomo de Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU).

Li pasigis ok jarojn en sovetia koncentrejo ĉe la fifama Kolyma. La ceteron de sia vivo li devis pasigi en la ekstrema Nordo kiel ekzilito. Tamen post dek jaroj (post la morto de Stalin) li estis rehabilitita kiel senkulpa.

Nikolaj Rytjkov revenis en Moskvon kaj plu laboris kiel aktoro. Li estis unu el la motoroj de Moskva Esperanto-Klubo. Esperanto estis ĉefa parto de lia vivo. Kiam ajn mi venadis en Moskvon, mi vidis lin en klubaj kunvenoj. Li ofte partoprenis koncertojn kaj brile deklamis. Li ŝatis deklami precipe poemojn de Kalocsay kaj Majakovskij. Li estis perfekta stilisto kaj ĉiam pretis doni trafajn lingvajn konsilojn: ankaŭ mi ŝuldas al li unu.

Li estis samaĝulo de miaj gepatroj kaj rilatis al mi patre. Kiam en 1962 en Unio de Sovetiaj Societoj de Amik-eco kun Eksterlando (konata sub la rusa mallongigo SSOD) aperis vakanta posteno de oficisto pri Esperanto (!), Nikolaj Rytjkov rekomendis min. Ha! Mi imagas nun, kiel „plaĉis” al superuloj rekomendo de la politika malliberulo (ili ĉiam restis sub suspekto de nelojaleco)! Kom-

preneble, oni dungis ne min (lingviston), sed direktorinon de parko, kiu ne sciis, kio estas Esperanto.

En 1963 ni ambaŭ partoprenis en la 48a UK en Sofio, kie Nikolaj Rytjkov es-



tis tre aktiva kaj feliĉa, ke li povas komunikiĝi kun samideanoj diverslandaj.

Li tre amis sian landon, sed kun la tempo li venis al la konkludo, ke li ne plu povas vivi tie: ja la periodon de „degelo” iom post iom anstataŭis „frostoj”; li perdis sian optimismon pri perspektivoj de Esperanto en Sovet-Unio; kaj ankaŭ lia familia vivo ne estis feliĉa. Kaj li decidiĝis pri tre riska solvo. En

1965, post la fino de Esperanto-konferenco en Vieno, li petis politikan azilon. Pri tio skribis ĉefaj gazetoj de okcidenta Eŭropo.

La vivo de la enmigrinto, kies profesio estas ligita al la rusa lingvo, estis tre malfacila. Kelkaj esperantistoj laŭeble helpis lin, ĝis li trovis laboron de parolisto kaj lingva redaktoro en la rusa sekcio de la brita radiostacio BBC. Nun oni povis aŭdi en Sovet-Unio lian specifan voĉon tra muĝado de radio-malhelpiloj: ja la sovetia gvidantaro ĉefe timis la Vorton kaj tial ne enlasis en la landon eksterlandajn gazetojn kaj malhelpis aŭskulti eksterlandan radion.

Nikolaj Rytjkov trovis eblojn ankaŭ profesie aktori. Lia plej granda sukceso estis rolo de Lenin, kiun li ludis germanlingve en okcidentgermana televida filmo „Intercivitana milito en Rusio”.

Sed ĉefe li estis feliĉa, ĉar li povis libere esperantumi. Li partoprenis Universalajn Kongresojn kaj aliajn movadajn aranĝojn, en kiuj li deklamis kaj komunikiĝis.

Sed lia vivo daŭris nelonge: en 1973 li mortis pro kancero. Li vivis por Esperanto, kaj lia nomo restu al ni konata!

Boris KOLKER

Sub la signo de Liro kaj Verda Stelo. Memorlibro pri aktoro Nikolaj Rytjkov. Kompilis M. Abolskaja. Eld. Impeto, Moskvo, 1999. 48 paĝoj vinktitaj. Fote ilustrita. ISBN 5-7161-0060-0. Prezo ĉe FEL: 2,35 eŭroj + afranko.

Jen denove Bruna Ŝtono

En 1978 dum la Universala Kongreso en Varno (Bulgario), en la ekskursita tago, kiam la kongresejo malplenis, Renato Corsetti invitis min por neoficiala koncerto de bardo Gianfranco Molle [ĝanfranko mole]. Mi venigis ankaŭ miajn amikojn, Viktoron Aroloviĉ kaj Mikaelon Bronŝtejn (kun la kromnomo Bruna Ŝtono), ŝatatan bardon en la sovetia parto de Esperantujo sed nekonatan eksterlande. Post kelkaj aldonaj kantoj fare de alia populara bardo, Jacques Le Puil [jak le pŭil], Viktoro kaj mi pene persvadis Mikaelon prezenti ankaŭ liajn kantojn. Konfuzita, li prenis gitaron kaj prezentis tri siajn kantojn plenajn de amo al Esperantujo. Oni afable aplaudis, sed taksis

la melodiojn kaj temojn iom eksmodaj.

En la „periodo de stagnado” en Sovet-Unio, kiam superuloj klopodis steriligi la liber-aman Esperanto-movadon, kuraĝaj protestaj kantoj de Mikaelo havigis al ni optimismon. Feliĉe, li evitis persekutojn, kiuj estis eblaj.

Kiu ne konas Mikaelon Bronŝtejn hodiaŭ! Dum la lasta jardeko furoras liaj kantokasedoj kaj libroj *Oni ne pasas en Jamburg* (kun Esperanta fono) kaj *Legendoj pri SEJM*, ne parolante pri aliaj libroj, originalaj kaj tradukitaj. Tre bone lin konas partoprenantoj de Universalaj Kongresoj pro liaj koncertoj kaj organizado de artaj programoj.

Finfine Mikaelo kolektis iom el siaj versaĵoj kaj kantoj kaj eĉ du novelojn

Supraĵe rozkolora

Verŝajne malmultaj el niaj legantoj dubas pri la aserto, ke la demokratio estas, eble, la plej bona politika ŝtatformo, kiu ekzistas. Plej multaj ja loĝas en tiaj landoj sin nomantaj demokratiaj. Oni do ankaŭ juste povas demandi sin, ĉu indas verki libron, kiu pritraktas la demandon „Kio estas demokratio?”

La libro dishakis la bazan demandon en 80 erojn, kaj tiel atribuas atenton eĉ al la plej eta detalo. Bedaŭrinde, la respondoj estas sufiĉe evidentaj, tiel ke nur jen kaj jen ili invitas al iom pli profunda pripensado. Eble, por nesciantoj pri demokratio – infanoj el la unuaj klasoj de la mezlernejo – la libro povus utili.

Por diskuto en pli alta tavolo, ĝi apenaŭ povas funkcii kiel fonto. Tial ĝi tro okulfrape evitas tiklajn punktojn aŭ ekskludas eventualajn meritojn de alternativaj teorioj. Ĉu vere la komunismo alportis nenian valoron al la socio kaj ĉu la socialismo tute senkreditiĝis (p. 134)? Krome, ĉu la socialismo kaj la demokratio nepre ne povas kunvivi? Ĉu la mono vere tiom malmulte gravas en la demokratia decidado kiel prezentas tion tiu ĉi libro? Ĉu ne estas cirkla rezonado aserti, ke la demokratio dependas de liberaj informiloj, dum liberajn informilojn sekurigas la demokratio? Ĉu la hodiaŭa libera merkatekonomio neniel bremsas aŭ eĉ misgvidas la demokration? Ĉu la libereco de torturo estas la lasta el la homaj rajtoj kaj ĉu mortopuno nepre devas resti ekster la diskutoj?

por kunigi ilin en la libron *Jen denove...* La verkoj estas mallongaj, netaj laŭforme, verkitaj per simpla lingvaĵo kaj facile legeblaj. En ĉiuj ili sentebblas la personeco de la aŭtoro, lia amo al homoj (bonaj homoj!) kaj al la naturo, amo al sia lando kaj ĉagreno pro ĝiaj malfacilaĵoj kaj ombraj flankoj. Plej bone li sentas sin en la amika kompanio en Esperantujo, kio ruĝfadenas tra la tuta libro. Kaj la tuta libro estas penetrita de subtila humuro.

Speciale amuza estas la klopodo transplanti en Esperanton la rusan junularan slangon. Iujn lokojn en la libro oni povas ĝuste kompreni, nur konante la fonon, kio ne ĉiam eblas por la internacia leganto. Iuj lokoj bezonus pli zorgan redaktadon.

La traduka parto de la libro estas negranda, sed ĝi estas parteto de la kremo de la rusa poezio kaj havas apartan valoron. Precipe atentindas

Jen nur kelkaj demandoj pri libro, klare verkita de okcidentanoj, kiuj pretas alrigardi sian propran mondon

kiel ekzemplan – iom rozkoloran. Sed estas malfacile ion ajn kompari, se estas nur unu aĵo en la balancilo. La aŭtoroj tro facilanime akceptas la elirpunktojn de institucioj, ekonomia sistemo kaj ŝtatorganizado, kiujn ili fakte devus kritike konsideri.

Kvankam sendube demokratio havas sian meritojn, tamen ĝi ankaŭ dependas de la bonaj aŭ malbonaj intencoj de homoj. Sed fakte, tion oni povas aserti pri iu ajn politika ideologio. Bona reĝo finfine povus esti preferinda super malbona popola registaro. Kaj se plimulto postulas maljustaĵon, tio ja estas demokratio, sed, tamen, ankaŭ maljustaĵo.

Laŭdan mencion meritas la lingvostilo de la libro kaj la (tamen) kritikinstigaj desegnaĵoj, tiel ke inter la linioj oni povas iom trovi la kritikeman starpunkton, ĉi tie aluditan.

Guido VAN DAMME


David Beetham kaj Kevin Boyle: *Kio estas demokratio?* Tradukis Geoffrey Sutton. Eld. UEA, Rotterdam, 2000. 142 paĝoj. ISBN 92 9017 066 2. Prezo ĉe FEL: 9,90 eŭroj + afranko.

tradukoj el Nobel-premiito Iosif Brodskij (iam forpuŝita el Sovet-Unio en Usonon), kiu persone donis al Mikaelo permeson traduki en Esperanton liajn verkojn. Por iom gustumi el la poezio de Mikaelo Bronŝtejn, jen lerte plektita komenco de lia versaĵo „Pluvo”:

Gutoj frapadas al la
Haŭto de l' vangoj pala.
Kiom da ili? – Mil da.
Ĉies tuŝeto – milda.
Kun la tuŝetoj vantaj
Larmoj apenaŭ salas,
Kaj de-sur viaj vangoj
Ili jam akve falas.

Boris KOLKER

Mikaelo Bronŝtejn: *Jen denove...* Eld. Impeto, Moskvo, 1998. 119 paĝoj glue binditaj. ISBN 5-7161-0050-3.



Anna Löwenstein

Dua eldono

La ŝtona urbo

Anna Löwenstein

LA ŜTONA URBO

Ampleksa historia romano. Juna keltino en la unua jarcento de nia epoko estas portita al Romo kiel sklavo. *La ŝtona urbo* esploras ŝian penan lukton por adaptiĝi al la vivo en pli „progresinta” socio – kvankam, kiel oni malkovros, la kelta civilizacio ne estis tiel primitiva, kiel oni nuntempe emas supozi. En Romo ŝi ekkonas la fruajn kristanojn, kiuj estas ne sanktuloj sed aktivuloj en nova movado ofte dividita pro kvereloj kaj polemikoj.

La rigore kontrolita lingvoprovizo de la romano konsistas nur el fundamentaj kaj oficialaj radikoj.


Paĝoj: 356; 21 cm; glue bindita; 1999.
Serio Stafeto, n-ro 23; ISBN 90 71205 77 0.

Prezo: 24,00 EUR

Dua eldono

Internacie kuiri

Maria Becker-Meisberger



Ĉu vi ŝatus hipoglosan laŭ muelistina maniero kun leontodo-salato aŭ prefere unue Ukrainan barĉon kun pampuŝoj kaj kiel ĉefpladon „Amo kamuflita”? Tiujn ĉi kaj ducenton da aliaj internaciaj receptoj vi trovos en la kuirlibro por frandemuloj.

Paĝoj: 192; 21 cm; kudre bindita; 2000.
ISBN 90 71205 70 3.

Prezo: 10,00 EUR

Furoro de FEL

Informoj:
tlf. +32 3 234 34 00;
tlk. +32 3 233 54 33;
rete: butiko@fel.esperanto.be
<http://retbutiko.esperanto.be>

Monato

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; legantoj en 65 landoj; fondinto: Stefan Maul; 22a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato; abontarifo varias laŭlande (petu ĝin de la eldonejo)

Eldonejo: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: monato@fel.esperanto.be
TTT: <http://monato.esperanto.be>
Valida anonctarifo: n-ro 9; kompostita kaj presita en la eldonejo

Ĉefredaktoro: Stefan Maul, Pferseer Str.15, D-86150 Augsburg.
Retpoŝto: maul@newsfactory.net

Redakcia sekretario: P. Peeraerts.

Reviziantoj: Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley-Evans, Jens S. Larsen, Brian Moon, Izabel C. Oliveira Santiago, Alexander Schlafer, Katalin Smidéliusz, Anna kaj Mati Pentus, Mikaelo Lineckij.

Krome elsarkas erarojn la kontrolilo de la tekstprilaborilo Ĉapelilo 2.1.

Korektanto: Izabel C. Oliveira Santiago

Grafiko: Guido Baeyens, Eriko D'Hondt, Hugo Fontyn, Guido Van Damme.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj; represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rajto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 9,08 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen



MONATO - redaktoroj

Arto: Grigorij L. Arosev, ab/ja 31, RUS-117071 Moskva, Ruslando.
Reta adreso: desperanto@mtu-net.ru

Ekonomio: Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, 8000 Brugge, Belgio.
Reta adreso: rotsaert@esperanto.be (nur askiaj dosieroj!)
Komputilaj detaloj: WordPerfect 5.1 kaj 6, Word 6, Ĉapelilo, ASCII.

El mia vidpunkto: Stefan Maul, Pferseer Str. 15, 86150 Augsburg, Germanio.
Reta adreso: maul@newsfactory.net

Enigmoj: Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 59, 4700 Eupen, Belgio.
Reta adreso: jp@fel.esperanto.be
Komputilaj detaloj: Ĉapelilo, Word 97.

Eseoj: Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

Hobio: Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, 1010 Wien, Aŭstrio.
Reta adreso: a9308197@unet.univie.ac.at

Komputado: Edmund Grimley Evans, 20 Stone Street, Cambridge, Britio CB1 2PL.
Reta adreso: edmund@rano.org

Leteroj: Guido Van Damme, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio.
Reta adreso: guido@fel.esperanto.be

Libroj: Boris Kolker, 25 Severance Center Drive, #203, Cleveland HTS, OH 44118, Usono.
Reta adreso: kolker@stratos.net
Komputilaj detaloj: Ĉapelilo.

Noto: Librorecenzojn oni ne sendu al la redaktoro propralniciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

Lingvo: YAMASAKI Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio.
Reta adreso: syama@dokkyo.ac.jp
Komputilaj detaloj: DOS - WordPerfect 5.1; Mac - MS Word; sed per retpoŝto, bv. ĉiam sendi DOS-tekstodosieron!

Medio: Haszpra Ottó, HÚR u. 9A, III. lph. I/3, H-1223 Budapest.
Reta adreso: haot@freemail.hu

Moderna vivo: Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Reta adreso: 100103.3317@compuserve.com
Komputilaj detaloj: Preferas rete senditajn artikolojn, sed povas akcepti surdiske preskaŭ ĉion; ĝenerale uzas WordPerfect 5.1 aŭ 6; Ĉapelilo 2.1.

Noveloj kaj Poezio: Geraldo Mattos, R. João Motter 98, BR-81210-260 Curitiba, PR Brazilo.
Reta adreso: mattos@super.com.br

Politiko: Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Reta adreso: 100103.3317@compuserve.com
Komputilaj detaloj: Preferas rete senditajn artikolojn, sed povas akcepti surdiske preskaŭ ĉion; ĝenerale uzas WordPerfect 5.1 aŭ 6; Ĉapelilo 2.1.

Scienco: Haszpra Ottó, HÚR u. 9A, III. lph. I/3, H-1223 Budapest.
Reta adreso: haot@freemail.hu

Spirita vivo: Gerrit Berveling, Mussenhage 8, NL-8011 BH Zwolle, Nederlando.
Reta adreso: gerrit.en.madzy@planet.nl

Ŝerco kaj satiro: Stefan Maul, Pferseer Str. 15, 86150 Augsburg, Germanio.
Reta adreso: maul@newsfactory.net
Komputilaj detaloj: Ĉapelilo kaj Calamus por Windows.

Turismo: Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, 1010 Wien, Aŭstrio.
Reta adreso: a9308197@unet.univie.ac.at

Se la temo de artikolo, kiun vi verkis aŭ intencas verki, ne troviĝas en la supra listo, tiam ne sendu la tekston al MONATO.

anoncetoj

(Re)Abonu FONTO-n! La sola sendependa monata literatura revuo en Esperanto FONTO en januaro komencos sian 21an jarkolekton: numeroj 241 - 252. Aperas 12 numeroj jare - sendataj ĉiam po du samkoverte. Kun riĉa kaj varia enhavo. Por la tuta jaro 2001 tio kostas nurajn 60 guldenojn! Pagu al UEA - konto bays-f - kaj samtempe skribe aŭ rete informu la redaktoron Gerrit Berveling en Zwolle, Nederlando. Eblas kompreneble pagi per FEL, kiu estas unu el niaj perantoj! Ankaŭ ĉiuj antaŭaj jarkolektoj estas ankoraŭ haveblaj: nemalhavebla kaj riĉega fonto de la literatura E-historio de la lastaj 20 jaroj! Ĉiu jarkolekto 60 guldenojn; pri rabato por la tuto samtempe eblas interkonsenti.

Naturista Vivo, organo de Internacia Naturista Organizo Esperantista (INOE) en 2001 aperos kvarfoje, sur 4*24 paĝoj (la duonon konsistigas bonkvalitaj fotoj) kaj kostas 14 eŭrojn jare. Petu senpagan provnumeron de la redaktoro, József Németh, Fő u. 41/5 HU-8531, rete: nlalt@konyvtar.c3.hu.

Franclingve, kiam ekestas malvarme aŭ kiam oni timegas ion, oni diras: „J'ai la chair de poule!"; se oni tradukas tiun esprimon laŭvorte, ĝi iĝas: „Mi havas karnon de kokino!" Sed, laŭ iu vortaro, esperantlingve oni diras: **"Mi havas haŭton de ansero (aŭ anserhaŭton)!"**

Ĉu vi povas sciigi al mia klubo, kiel oni diras tion ĉi en via lingvo? Se ekzistas tia esprimo

en via lingvo, bonvolu sendi al ni: unue la esprimon en via lingvo, due ĝian prononcon (almenaŭ proksimume) kaj trie ĝian tradukon laŭvorte esperantlingve. Se ne, tamen skribu por diri, ke ne ekzistas tia esprimo.

Mi preferas leteran respondon al Esperanto-Klubo Luizo Pasteŭro, Collège Louis Pasteur, 48 Bd Paul Claudel, FR-13009 MARSEILLE (FRANCIO). Sed eblas sendi retan respondon al ekolopo@voila.fr. Miaj klubanoj estas infanoj ĉirkaŭ 12 jaroj. Je iliaj nomoj, antaŭe dankon!

Mia nomo: Jacques FERROUL; mia propra retadreso: jaef@voila.fr

Internaciisto: Organo de Internacia Komunista Esperantista Kolektivo (IKEK). Ĝi aperas ĉiun duan monaton. 16-paĝa D-A4. Ĝia enhavo temas pri socialismo kaj komunismo. IKEK akceptas rilatojn kun aliaj organizaĵoj samcelaj. Interesiĝantoj petu provexempleron: Internaciisto, str. Font Nova 32, 08202 Sabadell (Hispanio).

Se aŭskultas la animo de Guido Gezelle. Guido Gezelle estas unu el la plej grandaj poetoj nederlandlingvaj el ĉiuj tempoj. Li estas la granda kaj vera poeto de la bela flandra naturo, religia lirikisto, kiu sentis poezion kiel riveladon de la naturo. Li donis ion el sia koro, kiu elŝutis poezion, ne okupiĝante tamen pri iu skolo, pri reguloj aŭ konvencio. Li kreis ritmotrezoron kaj lingvon sukan, pitoreskan, ĉerpitan el la popolfonto, kaj tamen lingvon delikatan. La tradukon el la nederlanda prizorgis Hector Vermuyten, la granda Gezelle-konanto. La vorto "traduko" tamen apenaŭ taŭgas tie ĉi. Ĉiu Esperanto-versio estas nova poemo en si mem. La eldono de

hodiaŭ estas reeldono kun korektoj, de la jam delonge elĉerpita versio de 1939. Prezo ĉe FEL (retbutiko.esperanto.be): 7,10 eŭroj + aŭfranko.

The Grammar of Esperanto. A corpus-based description. Aŭtoro: C. Gledhill, Fako de lingvoj modernaj, Universitato St. Andrews, Skotlando. Mendu vian ekzempleron de FEL (retbutiko.esperanto.be). Prezo 33,30 eŭroj.

Kreu vian propran librokatalogon! Per la komputila programo de la Retbutiko (<http://retbutiko.esperanto.be>) vi povas krei librolistojn laŭ via propra deziro! Ĉu vi deziras libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Aŭ ĉu vi preferas liston de difinita aŭtoro, ekzemple de ĉiuj haveblaj verkoj de Marjorie Boulton aŭ de Nemere? Eble vi volas nur scii, kiu estas la aŭtorino de *La ŝtona urbo* aŭ kiu estas la eldonjaro de *Murdo en Esperantujo*? Ĉio tio eblas en la retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin. Vi estas bonvena!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la interretpaĝoj de FEL: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.html.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140
2000 Antwerpen

valoro: _____

Donaca karto

subskribo: _____

bonvolu ne skribi en tiu ĉi karto

Utila Donaco!

- Difinu mem la valoron de via donaco.
- La kupono estas interŝanĝebla kontraŭ libroj, diskoj aŭ Monato-abono.
- Mendu la kuponojn ĉe butikoj de Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Tel:+32 3 234 34 00 Fakso: +32 3 233 54 33
Retpoŝto: butikoj@fel.esperanto.be

IDEALA por libroamantoj ...

La serio Stafeto de Flandra Esperanto-Ligo estas daŭrigo de la fama eldonejo de Juan Régulo Pérez en La Laguna. Kiel iame en Kanariaj Insuloj, la verkoj kiujn FEL markas per Stafeto, estas altkvalitaj literature kaj prese. Depost 1986 en la serio jam aperis verkoj de i.a. Gaston Waringhien, Edwin de Kock, Krys Ungar, Eŭgeno Miĥalski kaj multaj aliaj.

Anoj ricevas dekonan rabaton (10%) je ĉiuj libroj en la serio Stafeto de Fel.

Ŝparu kaj estu ĝisdata!

Membroj de librorondo Stafeto ricevas novaperintajn Stafeto-librojn kiel unuaj, tuj post apero kaj ĝuas rabaton kiu por unu aŭ du ekzempleroj de sama titolo altas 10%, kaj ekde tri ekzempleroj eĉ 40%!

Kiel funkcias?




Vi deponu ĉe ni 25 EŬR (depono = mono kiu restas via kaj kiun vi kiam ajn povas repostuli). Vian monon ni utiligos por eldoni librojn. Kiam aperas nova libro en la serio, vi apartenas al ĝiaj unuaj legantoj.

Via garantio

Se ial ne plaĉas al vi unu el la libroj kiujn ni al vi sendas, vi simple resendu la libron ene de ok tagoj kaj neniom pagu. Krome, ajnmomente vi rajtas retiriĝi el la librorondo. Vi ricevos vian deponon kaj ni ne plu sendos al vi librojn.

Ĉu io por vi? Skribu al FEL:

Flandra Esperanto Ligo
Frankrijklei 140
2000 Antwerpen
tlf. +32 3 234 34 00
tlk. +32 3 233 54 33
rete: butiko@fel.esperanto.be
<http://retbutiko.esperanto.be>



Stafeto
librorondo

